Driemaandelijks tijdschrift — Afgiftekantoor: Antwerpen X
Jarkolekto 25 — trimonata

3/95

INTERNACIA PEDAGOGIA REVUO

Organo de Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj ILEI

Redaktoro: Jozefo NÉMETH

Vicredaktoro: Katalin SMIDÉLIUSZ

Kunredaktintoj de la aktuala numero:
Ervin FENYVESI, Stefan MacGILL,
Géza KURUCZ kaj Johano KIRSCH

Respondeca eldonanto (verantw. uitgever): E. Symoens, Putsesteenweg 151, B-2920 Kalmthout

IPR

Redaktejo: NÉMETH József
H-8500 Pápa, Kilián ltp. 75/9
☎ + 36-89-315-836 (hejma kun respondaparato)

Presado: Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140,
B-2000 Antwerpen, ☎ +32-3-234 34 00

Enhavo

CHARTERS, Duncan: *Salutvortoj...por la Finnlanda Konferenco* 1
Plene kaj idilie ni konferencis (smg) 2
Rezolucioj de ILEI al UNESKO kaj al la Membraro 3
Trijara Laborplano de ILEI (1995-1997) 4
Ni prezentas novajn estraranojn de ILEI: B. Casini kaj A. Rojas 6
VAHA, Blazio: *Fantazie kaj didakte* 7
KURUCZ, Géza: *La unua leciono* 14
KAPISTA, Terezija: *La unua renkontiĝo kun Mazi* 15
MacGILL, Stefan: *La aŭkcio: simpla aŭskulta kompreno* 16
El la landoj kaj sekcioj 20
Por via notlibro (konkursoj, eldonaĵoj, korespondado) 28
Leterkesto 35

Katalin Smidéliusz, nia vicredaktoro, estas atingebla ankaŭ tra komputilreto. Ŝia adreso: smidik@fs2.bdtf.hu.Vi povas atingi la redakcion ankaŭ telefakse. Ĝin sendu al la laborejo de la edzino de Jozefo Németh: *Némethné Varga Mária* (36-89) 324953

ESTRARO DE LA LIGO

Prezidanto: d-ro Duncan Charters, 25 Elsah Hills Drive, Elsah, IL 62028-9750 Usono; tel. 1-618-374-2453, fakso: 1-618-374-5122. Internet: charters@csc1.prin.edu. *Kunordigo, planado, rilatoj kun UEA kaj la movado, instruista trejnado.*

Sekretario: Marija Beloševiĉ, Sveti Duh 130, HR-10000 Zagreb, Kroatio. Tel. (385 1) 576092. *Landaj sekcioj, membro-varbado, konferenca administrado kaj ne-faka programo.*

Kasisto: Bertil Andreasson, Södra Rörum pl. 455, SE-242 94 Hörby. Tel. (46 415) 501 52. *Financo, konferencaj financoj. Membraro.*

Vic-sekretario: Prof. Zhang Danchen, General Foreign Languages Dept., Huazhong Normnal Univ., CN-430070 Wuhan, Ĉinio. *Azia agado, ekzamenoj en Ĉinio kaj Azio.*

Membro: D-ro Till Dahlenburg, Feldstr. 13, DE-19412 Brüel, Germanio.Tel. (49 38483) 528. *Ekzamenoj, faka konferenca programo. Metodikaj seminarioj.*

Membro: Brunetto Casini, Casella Postale 213, I-56100 Pisa, Italio tel. 39 50/48 670, fakso 39 50/50 05 85

Membro: Atilio Orellana Rojas, Casilla de Correo 1428, AR-5000 Cordoba, Argentino

Estrara komisiito: Prof. Ronald J. Glossop, 8894 Berkay Ave., Jennings, MO 63136, Usono. Tel. (314) 869-2303. *Eksteraj rilatoj, instruado de infanoj.*

Estrara komisiito: Zsuzsa Barcsay, Bem Rakpart 25/B, HU-1011 Budapest, Hungario. Tel. (36 1) 201-2342. *Gimnazio de ILEI. Servoj al instruistoj, trejnado de instruistoj.*

Estrara komisiito: Stefan MacGill, Fácán köz. 9/2, HU-2030 Érd, Hungario. *Eldonado*

Observanto (UEA): Renee Triolle, Bello Bauco, Chemin de la Civade Verde, F - 77160 Provins, Francio

Salutvortoj de la prezidanto de ILEI
por la Finnlanda Konferenco 1995

Estimataj kolegoj kaj kunlaborantoj,

jam la duan sinsekvan jaron mi sendas al vi salutojn fine de la ĉiujara kursaro en San-Francisko, kun bedaŭro ke mi ne povos esti ankaŭ kun vi en Finnlando.

Lige kun la konferenca temo, mi jam anticipe preparis skizan enkonduko al ĝi por IPR, kaj espereble tiu kaj aparte la pli detala studo de Katalin Smidéliusz pri aspektoj de la propedeŭtika valoro de Esperanto spronos viglan kaj utilan diskutadon. Kion ni povas jam dokumenti pri niaj asertoj? Kiel ni povos pli bone utiligi la faktojn pri la valoro de Esperanto kiel enkonduko al studado de fremdaj lingvoj? Kiel ni povos subteni eksperimentojn kiuj pli definitive montros ne nur tiun valoron, sed samtempe la valoron de nia lingvo mem kiel kultura perilo kaj komprenigilo?

Ĉe la sojlo de novaj jarcento kaj jarmilo, la teĥnologio efektive favoras nin, ĉar efikajn ligojn inter lernejoj diverslandaj kaj diverskulturaj ni ja povos krei eĉ post nur kelksemajna lernado de nia lingvo.

Krome, heliĝas la perspektivo rilate materialojn. Se vi tralegis la lastan ekzempleron de IPR de la pasinta jaro, vi certe konscias pri la "nova ondo de lernolibroj" pri kiuj skribis Stefan MacGill kaj aliaj. Kaj venas "Mazi" kaj aliaj videoprojektoj, venas komputilaj programoj kaj trareta, transnacia komunikado. Persatelitaj radioelsendoj en Esperanto ankaŭ montras unu alian vojon kiu povos malfermiĝi al ni en la estonteco kiam la kostoj tion permesos.

Do progreson ni certe antaŭvidas. Niaj taskoj kaj defioj restas similaj kiel en antaŭaj jaroj: kiel organizi nin plej efike por ke ILEI povu plenumi kaj pliampleksigi la esencan rolon kiun ĝi devas havi en la Esperanto-movado. Estrar-elektoj donos la okazon pritaksi la homfortojn kiujn ni disponas, kaj organizi nin pli efike por subteni la diversajn agadojn kiuj favoras la instruadon de Esperanto en novaj cirkonstancoj.

Mi per tio finos dezirante al vi fruktodonan laboron, kaj ni planu efikan jaron de kunlaborado kiu maksimume profitos el la pasintjaraj atingoj.

Duncan Charters, Prezidanto de ILEI

PLENE KAJ IDILIE NI KONFERENCIS

Ĉiuj el la kvindek lokoj en la idilie izolita centro Övik estis okupitaj dum nia 29a konferenco komence de aŭgusto. Komuna aŭtobuso portis ĉiun el la UK ĝis la konferencejo, 50 km. oriente de Helsinki. La grupo estis negranda, sed tre internacia kun kvar kontinentoj reprezentitaj, ekz.: el Japanio, Koreio, Usono, Argentino, Kostariko, Kubo, Taĝikistano, Makedonio, Bulgario, la orkniaj insuloj kaj Aŭstralio.

Dum la malfermo, salutletero kaj pritema artikolo de la prezidanto, Duncan CHARTERS estis laŭt-legitaj. En la enkonduka faka prelego, pri la propra instru-programo, rakontis la italo Carlo BOURLOT, (v. IPR 94/3, p. 21) tuŝante iom la konferencan temon 'la propedeŭtika valoro de Esperanto', dum samlandano d-ro Maŭro LA TORRE prelegis pri pedagogia terminologio. Dum tuta vespero ni spektis kaj reagadis al la nova vidbenda kurso *Mazi en Gondolando*, dum alia ĉiu montris siajn elstarajn geografiajn konojn pere de partopreniga kvizo. En la lasta vespero, ni ĝuis koncerton prezentita de la malmultaj sed mult-talentaj partoprenintoj de la paralele okazinta Tria Gimnazio de ILEI (pri kio vidu apartan raporton) kune kun aŭkcio kaj loterio.

Dum la komitat-kunsidoj la diversaj raportoj estis akceptitaj. Tri estraraj lokoj estis voĉdonendaj, rezultante en du novuloj: Atiljo ORELLANO-ROJAS el Argentino (kiu vojaĝos vaste en la venonta jaro, duone en Eŭropo, duone en Latin-ameriko) kaj la eldonisto Bruĉjo CASINI el Italio. Nova honora membro de la Ligo fariĝas la antaŭa prezidanto, Edward SYMOENS.

Dum la konferenco funkciis libroservo, kie la plej nova eldonaĵo de la Ligo estis lanĉita, nome la ilustrita porinfana kantlibro de s-ro Jon RØMMESMO el Norvegio, kies preparlaboroj estis iniciatitaj reage al propono farita en la konferenco de Voss (Norvegio), tri jarojn pli frue.

La bela natura situo kaj atenta prizorgo flanke de la konferenca centro efektive memorigis pri Voss, sed nun kronita per lago-simila maro kiu invitis al remado kaj naĝado. Duontaga ekskurso al la apuda haven-urbo Porvoo inkluzivis interesan fakan viziton al finna lernejo, kiu emfazas metian kaj artan instruadon. Okazis ekzamena sesio kun du sukcesintoj, serio de 10-minutaj prezentoj de konferencanoj kaj model-lecionoj (vidbendaj kaj vivaj) preparitaj por la gimnazianoj. Tiuj montris frapan diversecon en la aliro al uzo de Esperanto por instrui fakajn temojn. Interalie, oni eklernis la finnan lingvon, enkapigis proverbojn kaj rol-ludis pri energi-politiko.

Pluraj bedaŭris, ke la anoncita konferenca temo ne ricevis pli da atento. Tamen, ĉi tiu iom familieca konferenco lasos belajn memorojn ĉe la plimulto de la partoprenintoj. Kiu estonte ne rebildigos al si la ĉirkaŭ-fajran kantadon kaj ŝercadon en la preskaŭ nokto-meza krepusko.

smg

REZOLUCIOJ

AL UNESKO:

Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI) dum sia konferenco en Övik, Finnlando, de la 31-a de julio ĝis la 4-a de aŭgusto 1995, la "Jaro de Toleremo":

konsciante pri la grandaj psikologiaj kaj financaj problemoj de la lingva komunikado en la mondo,

konvinkite pri la valoro de neŭtrala lingvo por la justa solvo de tiuj problemoj, emfazas sian fidon je la valoro de Esperanto, kiu ĝis nun, dum pli ol cent jaroj pruvis sian utilon kaj efikecon, ne nur kiel portilo por disvastigo de la naciaj kulturoj kaj de universala humanismo, sed ankaŭ kiel praktika rimedo por realigi tutmondan solidarecon, toleremon kaj pacamon;

proponas, ke la politikaj kaj kulturaj gvidantoj de la ŝtat-membroj instigu al scienca esplorado de la propedeŭtika valoro de Esperanto per plurnaciaj eksperimentoj, interalie kadre de LINGUAPAX,

rekomendas helpi la malpli avantaĝitajn grupojn, interalie handikapulojn kaj malriĉajn popolojn, per kontaktoj kaj materialoj.

AL LA MEMBRARO

Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj...

alvokas siajn membrojn **utiligi** la moderne allogan video-kurson "Mazi en Gondolando" por Esperanto kiel facile lernebla lingvo, kaj ankaŭ, laŭ aliaj versioj, kiel aliro al aliaj fremdaj lingvoj;

forte **apogi** la projektojn "EKPAROLI" kaj "FUNDAPAX", celantaj science pruvi la propedeŭtikan valoron de Esperanto;

montri sian solidarecon kun malpli avantaĝitaj kolegoj kaj lernantoj handikapitaj kaj en malriĉaj cirkonstancoj per kontaktoj kaj materialoj;

kaj **eduki** ĉiujn infanojn en la spirito de respekto al kulturo kaj naturo, kaj al tutmondaj pacamo, toleremo kaj solidareco.

GRAVE:

Surbaze de la Kontrakto inter UEA kaj ILEI, ambaŭ organizoj rajtas nomi la observantojn ĉe la estraroj de la alia. ILEI uzis ĉi eblecon, kaj jam kelkajn jarojn la reprezentanto de ILEI ĉeestas la estrarkunsidojn de UEA. Ĉi-jare UEA nomis sian observanton ĉe la Estraro de ILEI. Temas pri *s-ino Renée Triolle*. Ni deziras al s-ino Triolle, kiu estas longjara ILEI-ano bonvenon en ILEI-estrara rondo!

ILEI gratulas al novelektitaj membroj en la honora patrona komitato de UEA kaj novelektitaj honoraj membroj de UEA.

Apartajn gratulojn oni direktas al ILEI-anoj kiujn atingis la honoreco: *d-ro Humphrey Tonkin* (Honora Patrona Komitato), *Elfriede Ernst* kaj *Eduard V. Tvarožek* (honoraj membroj).

Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj:

TRIJARA LABORPLANO (1995-97)

1.Sekcioj kaj membraro:

1.1.Teni intensajn kontaktojn kun la sekcioj per vizitoj kaj regulaj cirkuleroj
1.2.Revigligi sekciojn neadekvate funkciantajn
1.3.Admoni sekciojn; esti maksimume malfermaj al junaj praktikantaj instruistoj kaj novaj agemaj fortoj
1.4.Starigi novajn vojojn, akcepti kotizpagojn
1.5.Starigi novajn sekciojn kaj nomi plurajn reprezentantojn
1.6.Eldoni freŝan varbilon por membrigo kaj donacoj al la fondaĵoj kaj kasoj
1.7.Daŭrigi per la konkurso "La plej aktiva landa sekcio"

2.Komisionoj kaj komisiitoj:

2.1.Malcentrigi la laboron per kreo de kerno de aktivaj internaciaj kunlaborantoj, ĉu kiel unuopuloj, ĉu kiel komisianoj
2.2.Laŭgrade transigi la pli rutinajn taskojn al honorariitoj, zorgante pri ilia trejnado por plenumi pli postulajn kaj vastgamajn taskojn

3.Financoj

3.1.Kreskigi la kapitalon de la Ligo per identigo de samtempe valoraj kaj enspezigaj projektoj
3.2.Alvoki por donacoj por la fondaĵoj kaj kasoj de la Ligo
3.3.Faciligi testamentadon al la Ligo
3.4.Ricevi monon el ekstermovadaj instancoj por plenumi edukajn projektojn

4.Ekzamenoj:

4.1.Reekzameni la postulojn de la elementa kaj meza ekzamenoj
4.2.Daŭre flegi la konsilarojn por la ekzamenantoj kaj kursocentroj
4.3.Daŭrigi kiel eble plej vastan proponadon de la ekzamenoj
4.4.Reeldoni reviziitan gvidlibron por la ekzamenoj
4.5.Praktike lanĉi la superan ekzamenon
4.6.Esplori la historion de la porinstruistaj ekzamenoj

5.Servoj al instruistoj:

5.1.Registri kursojn ĉiunivele kaj aperigi la rezultojn en la sama lerneja jaro
5.2.Registri la kondiĉojn por instruado en la diversaj landoj, kaj specife noti kaj ekspluati ŝanĝojn
5.3.Aperigadi korespond-petojn, inviduajn kaj klasajn
5.4.Diskonigi internaciajn aranĝojn por lernantoj kaj aparte zorgi pri la Gimnazio
5.5.Kompili la listojn de la lernejoj kiuj akceptos vizitanton kaj de la vizitantoj

6.Instruista trejnado kaj universitata agado:

6.1.Apogi kaj organizi Internaciajn Metodikajn Seminariojn tra la mondo
6.2.Fortigi la metodikan flankon de la konferencoj
6.3.Organizi trejnseminariojn por la instruistoj kaj instruantoj de E-o

6.4.Diskonigi la eblecon por internacia klerigo

7.Konferencoj:

7.1.Logi partoprenantojn el kiel plej diversaj mondpartoj, unuavice praktikantajn instruistojn kaj istruantojn de E-o
7.2.Fortigi la fakan programon
7.3.Faciligi interŝanĝon de spertoj pri instruado ĉiuspeca
7.4.Venontaj konferencoj okazos:1996 Ĉehio; 1997 Aŭstralio

8.Eksteraj rilatoj:

8.1.Kontaktiĝi kun UNESKO kaj UN pri internacia edukado
8.2.Aktive partopreni en la Jaro de la Toleremo
8.3.Kontaktadi kun jam konataj internaciaj edukaj organizaĵoj
8.4.Aktive kunlabori en eŭropaj sferoj
8.5.Konstrui kaj diskonigi superrigardon pri la ĉefaj fondaĵoj kaj organizaĵoj agante internacie pri lingvo-instruado
8.6.Proponi nacilingve tradukitajn aŭ verkitajn artikolojn al la faka gazetaro pri edukado por internaciismo, la propedeŭtika valoro de E-o, la praktikaj kaj etikaj valoroj de E-o, prezento de rezultoj de E-instruado
8.7.Reprezentiĝi en internaciaj konferencoj pri edukado kaj lingvo-instruado
8.8.Verki nacilingvajn flugfoliojn pri ILEI

9.Eldonado:

9.1.Daŭrigi eldonadon de la gazetoj IPR kaj "Juna amiko"
9.2.Akiri taŭgajn manuskriptojn, samtempe bezonatajn kaj enspezigajn
9.3.Prioritataj kampoj estas:
- lernolibroj, gvidiloj, kasetoj, vidbendoj
- pedagogiaj verkoj kaj instruistaj gvidiloj
- ekzerclibroj ligitaj al la ekzamenoj
- materialo pri lingvaj problemoj

9.4.Starigi "Pedagogian bibliotekon"
9.5.Kunlabori en la projekto "Instruista terminaro"

10.Movadaj agadoj:

10.1.Eluzi la diskonigajn eblecojn de UEA kaj aliajn por teni la movadanojn bone informitaj pri la Ligo
10.2.Fortigi la renomon de "Tago de la Lernejo" dum la UK
10.3.Starigi kontaktojn kun aliaj E-fakorganizoj
10.4.Kunlabori kun AIS, ELTE, KCE, IEI kaj similaj organizoj pri edukaj projektoj
10.5.Kunlabori kun TEC kaj aliaj pri la pedagogia terminaro kaj bibliografio

11.Bibliografio:

11.1.Kunlabore kun aliaj E-organizoj kaj E-centroj komenci kompiladon de ĝenerala bibliografio de ĉiuj E-eldonaĵoj rilate al E-instruado, lernejaj eksperimentoj, ks.

Ni prezentas novajn estraranojn de ILEI:

Brunetto Casini

Naskiĝis en la jaro 1954 en Pisa, Italio. Studis matematikon, kun statistika kaj informadika specialiĝoj. Lernis E-on kiel liceano en 1970, kaj de 1971 li estis estrarano pri eksteraj rilatoj de Itala E-junularo. De 1974 li estis estrarano de TEJO, ĝenerala sekretario dum ses jaroj kaj poste vicprezidanto. De 1977 li estas komitatano de UEA, unue kiel reprezentanto de TEJO, poste en kategorio A, reprezente de Itala LA, laste kiel komitatano C, de 1989 li estas revizianto de la kontoj de UEA por la komitato.

En 1977 li fondis eldonejon Edistudio, kiu de tiam regule eldonas librojn kaj muzikajn kolektojn en la internacia lingvo, same kiel librojn pri la internacia lingvo en la naciaj lingvoj, inkluzive de kolekto de instrulibroj, kiuj nombras kvar lingvo-kursojn por itallingvanoj, vortarojn; Esperanto-kroata kaj kroata-Esperanto, la internacian lernolibron "Kunvojaĝu" kaj (en preparo) grandajn vortarojn Itala-Esperanto kaj Hispana-Esperanto.

Lia kunlaboro kun ILEI datas je la internacia lerneja eksperimento organizita de Sonnabend kaj Dazzini, kiam la sciencaj rezultoj de la araŋĝo aperis libroforme ĉe Edistudio, kiu dum pluraj jaroj eldonis ankaŭ IPR. Plurjara ILEI-ano.

Atilio Orellana Rojas


Naskiĝis en 1963 en Las Termas de Rio Hondo, Argentino. Studis keĉuan lingvon en la Nacia Universitato de Santiago del Estero. Diplomiĝis pri klasika filologio en la Universitato de Cordoba, Argentino. Okupiĝis pri la keĉuismoj ĉe hispanparolantoj de norda Argentino, ĝia fonetika substrata agado kaj ĉeesto en toponimoj. Membro de porindiĝenaj organizaĵoj Kuska Tiyay kaj Survival. Aŭtoro de pluraj fakaj artikoloj, ĉefe pri la lingvoj, mitologio, kutimoj, muziko kaj situacio de diversaj indiĝenaj etnoj en Argentino kaj aliloke en Suda Ameriko.

Esperantisto ekde 1984. Li estas konata en E-medio kiel alte kvalifikita instruisto de Cseh-metodo. Cseh-kursojn kaj seminariojn gvidis en pluraj landoj, i.a. Koreio, Ganao. Helpis en la organizado de la pasintjara Afrika E-kongreso. Komisiito de UEA pri amerika agado. Membro de Internacia Ekzamena Komisiono de Internaciaj ekzamenoj de UEA/ILEI.

el niaj metiejoj...

Blazio Vaha:

FANTAZIE KAJ DIDAKTE



I.) FANTAZIE:

io, kio devus esti ne en pedagogia revuo

Oni parolas ofte pri sinonimoj, samsignifaj kaj proksim-signifaj v o r t o j; samsencaĵoj, proksimsencaĵoj je amplekso unu-vorta.

Laŭ la nun oftiĝanta „situacia" instruado, emfazanta rapidan alproprigon de kapablo komunikadi, oni povus rimarki (se iu sen tia instruado ne estas tion rimarkinta) ke proksim-signifaj aŭ samsencaj povas esti ne nur **vortoj** inter si (**vorto** kun **vorto** kiel ekzemple en la sekvaj paroj kaj serioj, kun elementoj *A)* egale Fundamentaj aŭ *B)* parte Fundamentaj, parte neologismaj: *bazo — fundamento; tero — grundo — agro — parcelo; aĝa — maljuna — olda*) sed ankaŭ **sintagmoj inter si** (kiel ekz. *tiu homo — la menciita persono*), **frazoj inter si** (*Kie vi loĝas? — Diru, mi petas, vian adreson*!), eĉ **vortoj** (frazovortoj) **kun** ampleksaj, strukturhavaj **frazoj**:

Ve (interjekcio, kun ebla valoro de frazo) — *Mi sentas doloron* — (Plurelementa, strukturhava frazo);

Ej (interjekcio por esprimi mildan malaprobon, kun ebla valoro de frazo) — *Kion vi faras, aĉa personeto, ĉesu tion fari*! — (Plurelementa frazo, same por esprimi mildan aprobon, pseŭdodemande);

Adiaŭ! — Iru, kara, kun paco, ĝis ne-scieble-kiama revido, havu miajn bondezirojn!

Idistoj[1] (ekde 1907-8) kaj aliaj volis forigi la tabelvortojn. Nunaj instruistoj de Esperanto povus tion kompreni: kiom ajn bela estas por nia racio la simetrieco de la tabelaj rubrikoj, kaŭzas problemojn du aferoj.

Unue, ke la distingaj silaboj estas plejparte senakcentaj, malfacile kapteblaj (*Kia? Kial? Kiel? Kien?*).

Due, ke la gelernantoj la tabelvortojn similajn inter si (*kio[n], kiom, kiam*) facile konfuzas: eĉ sukcese lerninte ilin, post tempo ili almenaŭ parton de ili reforgesas.

Mi volonte dirus, ke analoge al interjekcioj, frazovortoj kiel *ve, bis, adiaŭ* oni ekhavu, iom-post-iom, frazovortojn samsencajn kun elementaj demandoj.
Elementaj demandoj, laŭ mia penso, estas la diversformaj demandofrazoj pri la nomo de la alparolato, pri adreso, farto — kaj kelkaj similaj evidentaĵoj.

Kio estas tio? - estas, tiasence, elementa demando. *Kiu vi estas? Kion vi faras?* — elementaj demandoj. Ili povus havi ekvivalentan frazovorton. *Kio estas sub la rozokolora ŝranko en la ĉambro de Evinjo? Kiu povus pruntedoni al mi skribilon por du minutoj? Kion manĝis Aleksandro hieraŭ vespere?* — tiuj demandoj ne estas en la supre menciita senco elementaj, kaj do ili ne meritus havi frazovortajn ekvivalentojn aŭ proksim-sencaĵojn.

Havante tiajn pensojn, mi iam, antaŭ unu aŭ du jaroj uzis en eksperimenta teksto la frazvorton *Kutam*! kun la (fraza kaj situacia) senco *Diru, kiu vi estas, kiel vi nomiĝas, k i a estas via nomo*? (Zamenhofe); *K i o estas via nomo*? (nunece); krome mi uzis la frazvorton *Vap!* kun la (fraza kaj situacia) senco '*Diru, kie vi loĝas, diru vian adreson, informu min pri via trovloko*!'

La *Bulonja Deklaracio* el 1905 certigas, ke se iu ŝanĝas ion en la tiel nomata *Fundamento de Esperanto* — kun 1) 16-regula *Plena gramatiko* 2) *Ekzercaro* 3) *Universala Vortaro* — tiu ne rajtas pravigi sin dirante, ke „tiel deziras aŭ konsilas la aŭtoro de Esperanto". La *Fundamento*n de *Esperanto* oni ne rajtas modifi. En *Cirkulera letero al ĉiuj esperantistoj* (en 1908) L.L. Zamenhof asertas[2], ke la *Fundamento* ne malhelpas la „evolucion" de la lingvo, kaj ĝi povus ŝanĝiĝi eĉ „ĝis plena nerekonebleco", sed ja ne per rompado: novaj formoj ne elpuŝu malnovajn formojn aŭ (pli precize) ili ne elpuŝu la malnovajn formojn *antaŭ* ol la novaj formoj estas „sufiĉe *elprovitaj*" kaj „sendispute akceptitaj" per iom-post-ioma enpraktikiĝo. Ke la esperantistoj tamen preskaŭ nenion ŝanĝis, tio estas nur pro ilia saĝeco, pro la kompreno de tio, ke en lingvo plej gravas interkonsento kaj kontinueco - atentigas nin (en pluraj lokoj) Ludoviko Lazaro Zamenhof.

II.) **DIDAKTE**: *io kion mi rekomendas legi ankaŭ al tiuj, kiuj ne legis la parton fantazian.*

Ĉar mi konas la aluditajn ideojn de Zamenhof, kaj mi scias, ke enkonduki ion rompante (trude) la tradicion nek indas nek estas permesate, kaj ĉar mi konas ankaŭ la pravan *Golden*an ideon, ke instruante al infanoj (aŭ al plenkreskuloj) oni ne rajtas eksperimenti pri lingvo, mi neniam iun ajn demandis, uzante la frazovorton *Kutam!* aŭ la frazovorton *Vap!*. Tute diference: mi volis instrui al la infanoj en mia klaso sinonimajn, inter si similsencajn

frazojn por havigi tempon por la enmemoriĝo almenaŭ de la plej gravaj el ili, kaj por havigi al la infanoj pli elastan esprimkapablon. Tio parte respondas al la iama praktiko de Vilho Setälä kaj M. Butler[3]: jam *ili* uzis „adjektajn" demandojn (kaj respondojn) kun enmeto de *kiu*: *en kiu tempo:* 'kiam', *en kiu loko:* ' kie'; kaj de aliaj tabelpronomoj (*iu, tiu, ĉiu* ks.) por uzi responde similan sintagmon: *en iu loko* 'ie'; *en ĉiu tempo* 'ĉiam'. Butler cetere utiligis ankaŭ la „ekvacion" *kiel = kiumaniere*)

Mia celo estis ankaŭ, ke (por pli postaj situaciaj ekzercoj „dramecaj") la infanoj alproprigu lingve, ritme sufiĉe bonajn frazojn - ludante scenetojn jam en tiu lernoperiodo, kiam improvizataj dialogoj, komunikad-ludoj, liberaj skeĉprezentoj produktus ankoraŭ eble lingvajn fuŝaĵojn. Mi ĉion unue instruas perbuŝe kaj pororele; sur la disdonataj folioj mi strebas iel marki la akcentohavajn silabojn. Ĉar temas pri Hungaraj gelernantoj, mi atentas, ke la vorto *ne* ne forprenadu la akcenton de la sekva vorto: la segmenton *ne komprenas* mi prezentas kun dikigo de la silabo *pre* [*NdlR - en IPR nun ni prezentas tion kun kursivigo*]; en mia modelo kaj do ankaŭ en la infana reprodukto la vorto *ne* restas senakcenta aŭ havas nur malfortan akcenton. La komence fuŝita akcentado ja apenaŭ estas riparebla. Sur la marĝeno — por uzi la spacon — mi iam tajpas vortoparojn kiel en vortarkajerojn.

Mi pensis: post kiam infanoj kapablos prezenti miajn primitivajn dialogojn de „aliĝo" (pri *nomo, adreso, naskiĝloko*),[4] ili kapablos eble prezenti ankaŭ skeĉojn de Stefan MacGill[5] pri *veturado en urbo* aŭ *mateno en la hejmo antaŭ ekskurso* (aŭ iun ajn el la volumo *Tridek roluloj* aŭ el *Pordoj*). Fragmentoj el la subaj dialogoj estas preterlaseblaj: la gravajn partojn mi enkadrigos. La subtitoloj estas destinitaj por *la legantoj de la artikolo*. La dike presitaj partoj prezentas la *skemon* de la materialo.

Post ĉiu el la dialogoj mi prezentos tekston reciteblan aŭ kanteblan laŭ kapabloj de la instruanto kaj la instruatoj. Laŭ mia imago oni ne pasas al la dua temo kaj dua teksto antaŭ bona posedo (parkera scio) de la unuaj. Kompreneble, dume oni povas okupiĝi ankaŭ pri alia materialo (laŭ lernolibro).

Mi mem instruis ĉi tiujn dialogojn al infanoj en la Lernejo Géza Bárczi, en Budapeŝto, 3a distrikto, strato Bárczi, danke al permeso kaj kunlaboro de la instruistinoj *Gabriella* ***Demény*** kaj *Gyöngyvér* ***Demény***. Mi instruis laŭ *rajto de gepatra kunlaboro*: tio harmoniis kun la pedagogiaj principoj de tiu eksperimenta klaso.

ALIĜO

(Dialogas trankvila aŭ flegma oficistino kun pli kaj pli maltrankvila kliento)

Unua temo: **Pri nomo**

Kiu vi estas? Kiel vi nomiĝas?

nomo — .....
nomo — .....
..... — .....

A: -- **Via *no*mo!?**
B: -- Par*do*nu min, mi ne kom*pre*nas vin!
A: -- ***Di*ru vian *no*mon!**
B: -- Par*do*nu min, mi ne kom*pre*nas vin!
A: -- ***Di*ru, mi petas, vian *no*mon!**
B: -- Par*do*nu min, mi ne kom*pre*nas vin!
A: -- ***Di*ru, mi pete*ga*s, vian *no*mon!**
B: -- Par*do*nu min, mi ne kom*pre*nas vin.



A: -- ***Kiu* vi *es*tas?**
B: -- Par*do*nu min, mi ne kom*pre*nas vin. Kiu? —
.....
[en via lingvo]

A: -- ***Kiel* vi nomi*ĝ*as?**
B: -- Par*do*nu min, mi ne kom*pre*nas vin!
A: -- ***Di*ru, mi petas, *kiel* vi nomi*ĝ*as!** Kiel vi nomiĝas? —
.....

B: -- Mi estas....
A: -- ***Dan*kon! Mi tre *dan*kas vin!**
B: -- Nedankinde! Via demando estis tre simpla. Kiel vi nomiĝas? —
.....

Kantoj aŭ poemetoj (laŭ la maniero de la prezentado):

Kiu vi estas?	**Kiel vi nomiĝas?**
Kiu vi estas?	Kiel vi nomiĝas?
Kiu vi estas?	Kiel vi nomiĝas?
Kiu vi estas?	Diru, kiel vi nomiĝas!
Ho diru tuj!	Kiel vi nomiĝas?
Melodio: d d m s s ssl s m sss f r fmrd *d* - do (či tie: relativa); *r* - re; *m* - mi; *f* - fa; *s* - sol; *l* - la; *t* - ti = si (la tono sub *do*)	Melodio: Balado de Emeriko Bogár -- dankon al Attila Varró pro la helpo: dl tm ls / m'd m'r'dd / m'ddm' lf'm'm'r' d l t m l l

Dialogo kun ritmo: ***Mi nomiĝas mi***

A: Kiel vi nomiĝas?
B: Mi iĝis *mi*,
Mi iĝis *mi*,
kaj do *mi* no-
miĝas *mi*.

Pri adreso

Dua temo: adreso —
.....
Kie vi loĝas! via adreso —
.....

A: -- **Via *adre*so?**
B: -- Par*do*nu min, mi ne kom*pre*nas vin!
A: -- ***Di*ru vian *adre*son!**
B: -- Par*do*nu min, mi ne kom*pre*nas vin!
A: -- ***Di*ru, mi petas, vian *adre*son!**
B: -- Par*do*nu min, mi ne kom*pre*nas vin!
A: -- **Diru, mi pete*ga*s, vian *adre*son!** [diru]
B: -- Par*do*nu min, mi ne kom*pre*nas vin! vian adreson — .....
A: -- **En kiu *loko* vi loĝas?**
B: -- Par*do*nu min, mi ne kom*pre*nas vin!
A: -- **Kiu*lo*ke vi loĝas?**

A: -- ***Kie, kie, kie*, kiu*lo*ke vi loĝas?**
B: -- Par*do*nu min, mi ne kom*pre*nas vin! Kie? — .....
A: -- ***Di*ru, kara sin*jo*ro, *kie* vi loĝas?!** Kie? — .....
B: -- **Mi loĝas en Budapeŝto, 3a distrikto, strato Vig, numero 8.**

Pri naskiĝ-loko

Tria temo:
Kie vi naskiĝis! loko —
.....
naskiĝloko —
.....

A: -- **Via naskiĝ*lo*ko?**
B: -- Par*do*nu min, mi ne kom*pre*nas vin!
A: -- ***Di*ru vian naskiĝ*lo*kon.**
B: -- Par*do*nu min, mi ne kom*pre*nas vin!
A: -- ***Di*ru vian naskiĝ-*lo*kon.** Diru vian nas*ki*ĝo-*lo*kon!
***Di*ru la *lo*kon de via nas*ki*ĝo!**

B: -- Par*do*nu min, mi *tu*te ne kom*pre*nas vin!
A: -- **En *kiu lo*ko vi nas*ki*ĝis?!**

B: -- Pardonu min, kara sinjoro, mi ne komprenas vin!
A: -- ***Kiuloke* vi nas*ki*ĝis?**

B: -- Par*do*nu min, kara sinjoro, mi tut-*tu*te ne kom*pre*nas vin.
A: -- ***Kie, kie, kie*, kiu*lo*ke vi nas*ki*ĝis?**

B: -- Pardonu min, mi ne kom*pre*nas vin!
A: -- ***Di*ru, mi petas, fin*fi*ne, *kie* vi nas*ki*ĝis?**

B: -- Mi nas*ki*ĝis en Buda*pe*ŝto.
A: -- *Dan*kon!
B: -- Nedan*kin*de. Via de*man*do estis tre *sim*pla.

Por infanoj kantemaj aŭ recitemaj:

Kie, kie, kiuloke?
Kie, kie, kiu*lo*ke.
Kie, kie vi nas*ki*ĝis?
Mi nas*ki*ĝis, mi nas*ki*ĝis
en tre *be*la, *gran*da *ur*bo. [Aŭ: *en* tre *be*la, eta *ur*bo,
Aŭ: *en* tre *be*la vila*ĝe*to]
Melodio: ssfm ss l s ssfm ss f m / mmrd mm f m mmrd mm r d

Kvara temo: **Kiam, kiam, kiam, kiam...**

Kiam vi naskiĝis? tempo —.....
naskiĝtempo —.....

A: -- Via naskiĝ*tem*po?
B: -- Par*do*nu min, mi ne kom*pre*nas vin.
A: -- *Di*ru vian naskiĝ*tem*pon!
B: -- Par*do*nu min, mi ne kom*pre*nas vin. Kiam? —.....

A: -- ***Di*ru, mi petas, vian nas*ki*ĝo-*tem*pon!**
B: -- Par*do*nu min, mi ne kom*pre*nas vin!
A: -- **En kiu t e m p o vi naskiĝis?**
B: -- Pardonu min, mi ne komprenas vin.

A: -- **Kiu*tem*pe vi nas*ki*ĝis?**
B: -- Par*do*nu min, sin*jo*ro, mi ne kom*pre*nas vin! Kiam? —.....

A: -- **Kiam, kiam, kiam, kiu*tem*pe vi nas*ki*ĝis?**
B: -- **Mi nas*ki*ĝis en *mil nau*cent ...**

A: -- *Dan*kon! Mi tre *dan*kas vin!
B: -- Nedan*kin*de! Via de*man*do estis tre *sim*pla.

Kiam vi naskiĝis? (Kanto 1)	**Kiam, kiam, kiam, kiam** (Kanto 2)	
Kiam, kiam vi nas*ki*ĝis?	Kiam „kiam"? ... Kiam „kiam"?	
*Di*ru, *kiam* vi nas*ki*ĝis?	*Tiam* „kiam", kiam „kiam"!	
Kiam? Nu, *kiam? Kiam*? Nu, *kiam?*	Kiam „kiam"? Kiam „kiam"?!	
Kiam, Ma*ri*njo, vi nas*ki*ĝis?	*Ĉiam* „kiam", kiam „kiam"!	
Kiam, nu *kiam*? *Kiam*, nu *kiam*?		
Kiam, Zoli*ć*jo, vi nas*ki*ĝis?		
Melodio: d s, m d t, drd / smlssfmr	Melodio:	Kiam? —....
ffslf mmfsm / rrfls fmr s	//: mf s s d' t l l	Tiam —.....
ffslf mmfsm / rrfls fmr d	r' d' t t l s d' d'://	Ĉiam —.....

Kvina temo: **Pri telefonnumero**

A: --Via tele*fon*-nu*me*ro?
B: -- 1--333-666 (*UN*U — *tri*cent *tri*dek *tri* — *ses*cent *ses*dek *ses*)
A: - *Dan*kon. Ĝis re*vi*do. Fartu *bo*ne!
A: - Ĝis re*vi*do!

* * *

Fine, mi mencias, ke infanoj kapablas ĉe ĉiu ripeto aŭ modifeto de similsencaj demandoj *grimaci* aŭ *gesti nov-maniere*. Per tio ili amuzas sin - meme kaj reciproke - kaj nin, la instruantojn. Estas eble, ke diversaj infan-paroj elektas por si dialogon kaj ili prezentas po unu; ĉe la fino ili certe preskaŭ ĉiujn dialogojn scios parkere.

Piednotoj:

1) Vidu, ekzemple: E. GROSJEAN-MAUPEN: *Ido kaj Esperanto*. En: I. Ŝirjaev (iniciatinto - ĉefredaktoro) — L. Kökény kaj V. Bleier (red.) — K. Kalocsay (lingvofako): *Enciklopedio de Esperanto*. I. Volumo. Literatura Mondo, 1933. Represo: Hungara Esperanto-Asocio, Budapest, 1979, Vilmos BENCZIK (red.), pp. 236-8.

Ankaŭ: *Ido nyelvtan*, Komp. CSATKAI József. Szombathely. Az Ido Világnyelv Magyarországi Szövetsége. 1935.

2) Vidu: a, JURISPRUDENCO, pp. 113-5. En: L.L. ZAMENHOF: *Lingvaj Respondoj*. (Ed. G.WARINGHIEN). Sesa eldono. Marmande, 1962.

b, L.L. ZAMENHOF: *Originala verkaro*. Antaŭparoloj — gazetartikoloj — traktajoj. Paroladoj — leteroj — poemoj. Kolektitaj kaj ordigitaj de D-ro *Joh.* DIETTERLE. Ferdinand Hirt&Sohn en Leipzig, 1929. Esperanto-fako, pp. 445-8.

3) Vidu: a, *Vilho* SETÄLÄ: *Oportuna Vortaro de Esperanto*. Riĉe ilustrita. OVO-serio 2. Fondumo Esperanto, Helsinki. 1969. p. 47.

b, *Vilho* SETÄLÄ: *Privilegia vojo al lingvoscio*. Esperanto internacia lingvo. Ilustrita de *Asmo* ALHO kaj *Kylli* KOSKI. Kvina internacia eldono. 1981. pp. 6, 36-7.

c, Montagu C. BUTLER M.R.S.T.: *Step by Step in Esperanto*. A simple textbook for

English-speaking students. With graded reading matter and numerous exercises. The Esperanto Publishing Company. 1965. pp. 48, 86.
4) Infanoj sciantaj pli multe kaj diligentaj, povas lerni poemon de Marjorie Boulton: Aliĝilo. Vidu ekz. en: Szerdahelyi. Bevezetés és nyelvgyakorlatok. Kézirat. Tankönyvkiadó: Budapest, 1972, pp. 165-6.
5) Ekzemple:
a, Stefan MacGill: Ne batalu en tramo! En: Stefan MacGill: Tridek roluloj. Kvin skeĉoj kun ekzercoj; [...]. Ilustris Huibert Den Draak. Eldonis Tutmonda Esperantista Junulara Organizo. 1981: pp. 21-30.
b, Stefan MacGill: Blovas en la vent'. Teatraĵo por ses personoj kaj malbonŝanca kajto. En: Pordoj. Legolibro de skeĉoj kaj ekzercoj de Stefan MacGill. Ilustris Katie Keates. Eldonis Stefeto, marto 1984: pp. 57-71.

Géza Kurucz
La unua leciono

Ĉiu scias la proverbon: „*Unua paŝo iron direktas.*" Sendube la unua E-leciono havas eksterordinaran signifon por la futuro de la loka lingvoinstruado. Plie, neniam la atento de la lernantoj estas tiel aktiva ol en la unua leciono. Tiam la lernantoj akiras la unuajn impresojn pri la instruisto kaj ties metodo kaj precipe pri la studota lernobjekto. Ĉe E-o tiu ĉi lasta havas apartan emfazon, temas ja pri neordinara objekto, pri kiu cirkulas terure monstraj ideoj en la publika opinio.

La unua leciono havas do tre gravan, decidan rolon. Jen kial mi proponas ĝin projekti kun aparta zorgemo.

Miaopinie gravas, ke en la unua leciono la instruisto ne entreprenu vastan enkondukon, t.e. li ne filozofiumu longe pri la destino de la internacia lingvo, menciu nur kelkajn faktojn. Dek minutoj por tio certe sufiĉas. La instruisto neniam forgesu, ke lia aŭskultantaro estas plena de scivolo pri la lingvo mem, nekonata por ili.

En mia praktiko plej utila komenco montriĝis listo de tiel nomataj *fremdaj vortoj*. Mi transdonas al la lernantoj po unu folion kun ĉ. 80 internaciaj vortoj, zorge kompilitaj. Por ilustri mi prezentas kelkajn el ili: *sporto, Eŭropo, ŝoforo, ĝirafo, aŭtomato, ĥolero, septembro, Afriko, elefanto, revolucio, telefono..., eleganta, inteligenta, eminenta, ruĝa...*

Por kio mi uzas ĉi tiun liston? Ĉiu rigardas la vortojn kaj mi voĉe prezentas ilin laŭvice. Tiel dum 30 minutoj la geknaboj ellernas ne malpli ol 50 vortojn, la alfabeton kaj ortografion de la lingvo, esence la tutan fundamenton de la fonetiko, la ĝustan akcentadon (ili ripetas ĥore la antaŭlegitajn vortojn). Fine de la unua leciono jam ĉiu scias, ke la substantivoj en E-o finiĝas per *-o*, kaj la adjektivoj havas *a*-finaĵon. Kaj kiam elironte mi demandas: „Geknaboj, divenu, kion signifas *Afrika revolucio*, kaj poste *revolucia Afriko*?" - la plej saĝaj povas al mi traduki la esprimojn. Pri la sukceso atestas, ke en la paŭzo la lernantoj daŭrigas la lecionon laŭte recitante la vortojn kaj ĝojante, ke jen post la unua lernohoro ili jam konas tutan aron da vortoj en Esperanto.

Per tia komenco mi sukcesas disbati la plej gravan kontraŭargumenton (ofte nur subkonscian). Ili aŭdis jam anticipe, ke E-o estas artefarita lingvo, kaj artefarita sinonimas ĉe ili kun *arbitra, elpensita, surogata*. Kaj vidante, ke E-o uzas - kiel fundamenton de sia leksiko - vortojn, kiuj vaste internaciiĝis, kaj ke tiuj alprenas simple la karakterizajn finaĵojn, ili tuj komprenas la esencon de la metodo laŭ kiu laboris la aŭtoro, la „kreinto" de la internacia lingvo.

Tia enkonduka leciono havas ankoraŭ plurajn avantaĝojn. Vi mem spertos, se vi sekvos mian proponon.

Terezija Kapista
La unua renkontiĝo kun Mazi



Mi jam frue estis invitita ĉeesti KEKS-on (Kultura Esperanto Kampadejo en Sződliget - Hungario). Pro la fakto ke mi estis ĵus reveninta el Uk - Tampereo, mi havis ĉe mi la novaĉetitan „Mazi en Gondolando". Vidante ke inter ĉeestantoj estas 7 infanoj ĝi 15-jaraj, mi proponis Mazi-kurson.

Ĉar ni havis nur 6 tagojn je dispono kun multaj prelegoj, ekskursoj kaj abundaj aliaj programoj, mi ne povis fari veran kurson, sed ĉiutage montris po du partojn de la kurso. Fine mi iomete tradukis, klarigis kaj ripetigis kelkajn karakterizaĵojn, precipe demandojn.

Mi povis konstati ke ĝis la 6-a leciono la ĉeestantoj enkapigis la vortojn kaj povis uzi la demandojn. Sed poste jam venas pli malfacilaj partoj de gramatiko kun korelativoj kaj amaso da novaj vortoj, kaj pro manko de tempo ne ne iris plu. Tamen ĉiuj, kiuj rigardis la kurson, taksis ĝin interesa kaj decidis post reiro hejmen nepre lerni E-on.

Tiel nia unua renkontiĝo kun Mazi estis bonega varbilo por la lernado. Mi konstatis ke la kurso ne povas okazi sen 35-40 da studhoroj. Krome, ĉiuj devas havi la lernolibron, kiun oni povas aparte mendi.

La plej simpatia estis tio ke dum vesperoj la infanoj ludis la rolojn „herooj" el Mazi ripetante: mi estas bela, saĝa, forta, granda...

Bonvenon al Mazi en ĉiu societo, plibeligu viajn kursojn per ĝi.

Nova servo por instruistoj:

En IPR ni provos regule aperigi tasko-foliojn sur du apudaj paĝoj. Vi povos facile fotokopii ilin en via lernejo por akiri pretan instru-materialon. Apud la folioj ni aperigos konsilojn por la uzo. Kiu povos verki similajn foliojn estonte, bv. anonci sin al la redaktoro.

Stefan MacGill
La aŭkcio: simpla aŭskulta kompreno

Nia unua tasko-folio ekzercigas la aŭskultan komprenon. Tio estas nesimpla tasko, malmulta materialo ekzistas por tio, kaj ni emas kredi, ke nur poste en la kurso oni kuraĝu aŭskultigi. Sed modernaj lingvo-kursoj havas son- aŭ vid-bendojn, kaj oni aŭskultas jam de la komenco.

Kiel simpligi la taskon? Ni uzu situaciojn, kiuj estas interesaj (realecaj aŭ fantaziaj) sed kiuj postulas aŭskulti kaj kompreni nur limigitan vortostokon. Ni ne timu aŭdigi materialon, kiun la lernanto ne tuj devas aktive uzi. Ni eĉ ne insistu, ke la lernanto komprenu tuj ĉion aŭdigitan. Ni direktu la aŭskult-komprenan taskon, unue petante notadon nur de unu specifa informaro. En postaj reaŭdigoj, oni povas peti notadon de pli kompletaj kaj kompleksaj informoj.

Nia simpla situacio estas aŭkcio, ĉar tie diversaj homoj, kun diverssonaj voĉoj, nature kaj ripete krias monsumojn (do, ili uzas numerojn).

Niaj celoj:

- Kutimigi la lernantojn jam de la komenco de kurso aŭskulti dialogojn kaj rikolti utilajn informojn.
- Fortigi la kapablon rapide kaj ĝuste uzi kaj kompreni numerojn.

Kion vi faru:

Ve! En ideala mondo la Centra Oficejo de ILEI jam liverus kun IPR pretan sonbendon. En nia mem-serva mondo, ni invitas vin pretigi propran bendon (la instruisto kun kolegoj aŭ kelkaj lernantoj). Se iu pretigos bonan bendon, bv. informi ILEI, por ke ni trovu kopiigajn eblecojn.

Do, arigu helpantojn kaj preparu bendon. Sube ni donas proponatan fragmenton el la ebla dialogo. Variigu la enhavon laŭ la aĝo kaj nivelo de viaj studentoj. Por veraj komencantoj, la bendo enhavu eble nur la nomojn de la objektoj, la ofertojn kaj la minimume bezonatajn frazojn. Por pli kapablaj studentoj, aldonu adjektivojn, priskribojn de la aĉetintoj kaj

tipajn kuraĝigajn frazojn, ekz. "Ĉu vere nur kvindek stelojn vi ofertas por ĉi tiu unika kaj mirinda dento-broso?"

Bendo-komenca teksto:

Aŭkciisto: Bonan tagon gesinjoroj kaj bonvenon al nia aŭkcio. Ni aŭkcios hodiaŭ sep objektojn. La unua objekto estas ĉi tiu moderna malgranda radio. La rezerva prezo estas kvindek. Ĉu iu proponas kvindek?

Kvin voĉoj: Jes, kvindek. Sesdek! Sesdek kvin! Sepdek! Sepdek kvin!

Aŭkciisto: Ne pli? La radio havas kvar kanalojn! Ĉu okdek?

Kvar voĉoj: Jes, okdek. Okdek kvin! Okdek ses! Okdek sep!

Aŭkciisto: Okdek sep! Ĉu pli? Ne? Okdek sep por la unua fojo... Okdek sep por la dua fojo... kaj ...mi svingas mian martelon... por la tria fojo... BAM! Vendita! Vendita al la viro en la malantaŭo kun la stria ĉemizo! Gratulon!

(Notu kiom nature kaj senpene vi uzis kaj eĉ konigis la ordinalajn numeralojn (unua, dua, tria fojo) kaj pasivan participon (vendita). En taŭga kunteksto eĉ la plej kompleksa gramatikaĵo iĝas simpla, natura kaj senpene lernita! Nur, trovu la situacion!)



Se vi ne havas sonbendigilon, la instruisto laŭtlegu la verkitan tekston.

Jen adjektivoj por helpi vin:


televidilo: nigra-blanka, kolora, luksa, dudek-kanala, bon-kvalita...
fornoj: mikro-onda, gasa, elektra, konvena, praktika, rapida, efika...
fridujo: granda, alta, silenta, energi-ŝpara, vivmedi-amika...
toastilo: aŭtomata, kompakta, rapida, konvena, utila...
dento-broso: saniga, amuza, potenca, komforte tenebla, kun baterioj...

Jen hom-priskriboj por helpi vin

Vendita al...
...la viro en la malantaŭo kun la stria ĉemizo.
...la sinjorino en la dua vico kun la ĉarma (sed miskonduta) hundo.
...la junulo apud la pordo kun la malbela vizaĝo.
...la virino kun la grandega ĉapelo sidanta antaŭ la malalta vireto.
...la fraŭlino apud la fenestro kun la longa blonda hararo.
...la knabo apud la bufedo kun la grandega glacikremo.
...la sinjoro ekster la ĉambro kun la luksa aŭto kaj la portebla telefono.

GRANDA AŬKCIO

Kio estas aŭkcio? Ĝi estas vendo-sesio. En aŭkcio, aŭkciistoj vendas objektojn. Sed ne estas fiksitaj prezoj. Estas nur minimumaj aŭ komencaj prezoj. Ĉiu objekto havas minimuman prezon, sub kiu la aŭkciisto ne vendos ĝin. La aŭkciisto diras tiun minimuman sumon kaj petas pli altajn ofertojn. Aĉetantoj krias pli altajn prezojn unu post la alia. Kiu krias la plej altan prezon, aĉetis la objekton. Jen sep objektoj en nia aŭkcio:



Via instruisto aŭdigos al vi la sonon de tiu aŭkcio. Via aŭdos la aŭkciiston, kiu vendas la objektojn. Vi aŭdos la homojn, kiuj krias monsumojn. Eble vi ne komprenos ĉion, kion vi aŭdas. Ne gravas. En la unua aŭskulto, via tasko estas skribi nur ĉiujn monsumojn, kiujn vi aŭdas. Notu ilin en la suba tabelo:

Objekto	***Komenca prezo***	***Ofertoj***	***Vendo-prezo.***
Radio			
Televidilo			
Fridujo			
Elektra forno			
Toastilo			
Dento-broso			
Mikro-onda forno			

En la bendo la aŭkciisto laŭdas la objektojn: li diras bonajn aferojn pri ili. Li uzas adjektivojn, ekzemple: *bona, granda, mirinda*. Aŭskultu denove kaj notu ĉiujn adjektivojn, kiujn la aŭkciisto uzas pri ĉiu objekto:

Objekto	***Adjektivoj***
Radio	
Televidilo	
Fridujo	
Elektra forno	
Toastilo	
Dento-broso	
Mikro-onda forno	

En la fino, la aŭkciisto diras, kiu sukcesis aĉeti la objekton. Li ne diras la nomon, ĉar li ne scias ĝin. Li priskribas la personon: ekz. *la viro en la sesa vico kun la stranga verda ĉapelo*. Aŭskultu kaj skribu la priskribon por la sep personoj, kiuj aĉetis la objektojn.

Objekto	***Kia homo aĉetis la objekton?***
Radio	
Televidilo	
Fridujo	
Elektra forno	
Toastilo	
Dento-broso	
Mikro-onda forno	

Preparu propran aŭkcion!

Laboru en grupoj. Kolektu objektojn aŭ preparu bildojn de objektoj por la aŭkcio. La aŭkciisto kaj helpantoj fiksu la komencajn prezojn. Elpensu bonajn adjektivojn por ĉiu objekto — via instruisto helpos vin. La aŭkciisto bonvenigu ĉiun kaj unu post unu aŭkciu la objektojn. Aliaj grupanoj ofertu (eble preparu lud-monon).

Eble vi organizos art-aŭkcion. Desegnu famajn bildojn (ekz. *Sunfloroj* de van Goĥ aŭ *Virino en bluo* de Pikaso. Por tiaj mirindaj bildoj oni certe proponos milionojn!

BRAZILO

Interlanda Konferenco pri Instruado

okazos en urbo Campos do Jordao de la 12-a ĝis la 15-a de oktobro 1995. La pritraktota temo: „Uzo de modernaj instruhelpiloj". Por la Konferenco jam sin anoncis tiel gravaj figuroj de la amerika E-instruado, kiel Sylla Chaves, Geraldo Mattos kaj Elvira Fontes. Por pliaj informoj oni povas turni sin al s-ino Symilde Schenk-Ledon, Caixa Postal 269, BR-Campos do Jordao SP, 12460-000, Brazilo. Informis: *Atilio Orellana Rojas*

Senpaga Esperanto-kurso perkomputila

Antonio José Onofre Sampiao disdonas senpage (portugallingvan) Esperanto-kurson por komputilo. Sendu al li disketon de iu ajn modelo, kaj 3 respondkuponojn por ke vi ricevu la kurson. S-ano Onofre estas reprezentanto de Esperanto-Laborgrupo en Fortalezo. Lia adreso: *Rua Padre Francisco Pinto, 677 (Benfica), BR-60020-290 Fortalezo-CE, Brazilo*

BRITIO

Ne nur la fraŭlino Barlastonas - **raporto pri la kurso en Barlastono**

La plimulto el ni konatiĝis kun la nomo Barlastono pro la nekompareblaj kongresaj aperoj de la fama fraŭlino kun la brand-botela mansako. Sed la nomo same apartenas al mez-anglia vilaĝeto, situanta meze inter Manĉestro kaj Birminghamo, kies loĝantoj forte surpriziĝus ekscii pri ĝia tutmonda konateco. La ligo inter la du stariĝis pro renoma ĉiujara kultura kaj lingva kursaro organizata de britaj esperantistoj en *Wedgewood Memorial College*.

Denove en 1995, la kurso altiris kvindekon da studemuloj, kiuj tute plenigis la kolegion. La planitaj tri kursoj kreskis ĝis kvar, pro surloka pritakso de la bezonoj. Ĉiam almenaŭ unu gvidanto venas el eksterlando, ĉi-jare du (*Bert de Wit*, Nederlando kaj *Stefan MacGill*, Hungario) suplementis la enlandan teamon de *Paŭlo Gubbins, Rosalyne Edwards* kaj *Tim Carr*, kun speciala unutaga kunlaboro de *Marjorie Boulton* kaj *Kate Hall*. La plimulto de la kursanoj estis britoj, sed internaciecon donis familio el Japanio kaj partoprenintoj el Belgio kaj Irlando. La internaciaj ekzamenoj de UEA/ILEI estis ofertitaj; ok komence interesiĝis, sed nur du provis fine la tutan ekzamenon, ambaŭ sukcesis, je la meza nivelo.

La vesperaj programoj en Barlastono ĉiam elstaras, kvankam defion starigas la granda vario en lingvo-scio de la publiko. Tion brile superis la faka prelego de profesia ekologo Bert de Wit pri bio-diverseco. Ĉiu lernis

ion novan pri la temo, kaj dank' al klara elparolo, logika strukturo kaj projekciita skemo kun ŝlosilaj vortoj, eĉ la A-kursanoj povis bone sekvi la prezentaĵon. En alia vespero, li montris lumbildojn pri publikaj britaj ĝardenoj.

Apogeo estis la prelego de Marjorie Boulton pri tiu prisilentata vorto-speco: la interjekcioj, kadre de kiu ŝi regalis nin per akustika bankedo de bebo-ploroj, besto-blekoj kaj interjekcioj por alvoki, forpeli, trankviligi, konsoli, riproĉi vastan gamon da bestoj, birdoj kaj homoj. Multaj efektive uzatas, sed kiam vi lastfoje diris "**tpr!**" por trankviligi ĉevalon?! Ni ĝuis ne nur tiun observon, sed krome praktikan epitetigon de *ĉevalo*: 'malkomforta en la mezo, kaj danĝera ambaŭfine!'

Alia vespero malpli formalis, kun skeĉoj kaj partopreniga kvizo. Kaj la lasta bunte pleniĝis per adiaŭa koncerto, kun bufedo, fine de kiu kursanoj rifuzis enlitiĝi, sed enrondiĝis por aŭdi kaj kantadi ĉefe anglajn kaj irlandajn kantojn je diversaj gradoj de deceo.

Tia bonetoso rimarkeblis ankaŭ dum la ekskursa vizito al la kastel-ruinoj de Stafford kaj la tradicia Esperanta drinkejo, "La verda stelo" en la apuda urbo Stoke-on-Trent. Tie, laŭ la kutimo, oni pendigis flor-kronon ĉe ĝia Zamenhof-ŝildo. Videblas tie Esperanta montro-fenestro, kune kun 25-jare funkcianta vizitanto-libro entenanta multajn konatajn nomojn. La nuna verkanto trovis sian propran subskribon, kun nov-zelanda adreso, el marto 1976. Tio okazis pro gastigo ĉe la tiama urbestro de Stoke-on-Trent, Horace Barks, kiu, kune kun Marjorie Boulton kaj aliaj, starigis, multjare funkciigis kaj famigis la kursojn de Barlastono.

Ĉi tie vi trovos instigan semajnon en Esperantujo en agrablaj ejo (malnovstilaj sed tre taŭge ekipitaj domoj kun bonaj manĝoj) kaj situo (ĉarma vilaĝo, longboata kanalo, ceramika fabriko *Wedgewood* kun muzeo kaj ekspoziciejo). Informilo pri aranĝoj tie en 1996 (26-28a jan., teatra semajnfino; 2a marto, Mezlanda Esperanto-tago; 19-21a SATEB-jarkonferenco; 10-16a aŭgusto, 36a Esperanto-somerlernejo) jam haveblas de *Paŭlo Gubbins, 3 Arden Court, Mossley, Congleton, Cheshire, CW12 3JH, Britio*. *smg*

GERMANIO

Nun unuafoje en germanaj librovendejoj oni povas facile aĉeti dudirektan Esperanto-vortaron, ĉar la renoma eldonejo Langenscheidt aperigis „*Kompaktwörterbuch Esperanto*", kiu estas represo de la konataj poŝvortaroj de Erich-Dieter Krause en unu volumo. Ĝi kostas 29,80 germanajn markojn.

Mikro-intervjuo kun Ursula Fiebert

(Ndlr - Ni interparolis en la medioprotekta E-tendaro en Szödliget - Hungario).

J.N. *Vi estas profesia dungito de Germana Esperanto-Asocio. Kio estas via tasko kiel „Geschäftsführer"?*

U.F. Mi plenumas la taskojn de ĝenerala sekretario aŭ afergvidanto. Iom simpligite: mi estas tiu, ene de la asocio, kiu akceptas la informojn, prilaboras kaj poste disdonas ilin. La informojn mi kolektas ankaŭ el la ekstera, neesperanta medio. Ekzemple: ĉu ie oni povus organizi ekspozicion, partopreni foiron, organizi kursojn...

J.N. *Se vi jam menciis la kursojn: kion vi scias pri la E-instruado en via lando? En kiu formo vi kontribuas al la sukceso de la kursoj?*

U.F. Fakte mi ne havas ankoraŭ tre grandan superrigardon, aŭ almenaŭ ne ĉi tie, en la tendaro, ekster nia oficejo. Mia tasko estas koni la kursojn, kolekti la diversajn projektojn, informi la interesiĝantojn pri la projektoj, proponi metodojn, aranĝaĵojn. Cetere ankaŭ mi mem kompilis projekton „projekttagoj Esperanto". Ĝi ampleksas 25 A/4 formatajn paĝojn kun 8 projekcieblaj paĝoj kaj ĝi baziĝas sur la spertoj de kvartaga rapida kurso. Ĝi taŭgas por kursanoj, kiuj jam finis la okan gimanizian klason. Ĝi enhavas la lernomaterialon, la metodikajn sugestojn kaj ĉiujn bezonatajn materialojn. La tuta materialo aĉeteblas kontraŭ 20 DM en mia oficejo: Deutscher Esperanto-Bund - Geschäftsstelle, Immentalstr. 3. DE-79104 Freiburg.

J.N. *Ĉu vi mem serĉas la instruistojn aŭ inverse?*

U.F. Mi kontaktas tiujn, pri kiuj mi scias, ke ili faras kursojn.

J.N. *Kiel vi karakterizus la situacion de la E-instruado en Germanio?*

U.F. Ekzistas kelkaj aktivaj instruistoj kaj regionoj. La instruado okazas parte en popol-altlernejoj, sed ankaŭ la lokaj grupoj kaj la federaciaj ligoj organizas seminariojn.

J.N. *Eble ni klarigu al la legantoj, kion signifas popolaltlernejoj en Germanio...*

U.F. Ili estas perfektigaj kursoj, kiuj ĝenerale daŭras unu, aŭ - laŭdezire - plurajn semestrojn, kaj apartenas al la eksterlerneja kleriga sistemo. Ene de la popolaltlernejoj estas organizataj ankaŭ semajnfinaj, ĉ. 12-horaj kursoj (*Schnupperkurse*). Oni organizas ilin en plej diversaj temoj, ekzemple pri lingvoj, astronomio, komputado ktp. Ne estas iaj antaŭkondiĉoj por eniri la kursojn. La labordonantoj pli malpli agnoskas la scion akiritan en popolaltlernejoj. Ili ĝenerale funkcias en kulturdomoj. Sed la E-organizaĵoj, kiuj organizas kursojn ekster la popolaltlerneja sistemo, devas trovi taŭgajn ejojn por siaj kursoj. Ekzemple en la federacia lando Baden-Würtenberg kurso okazos apud Aalen, en kastelo.

J.N. *Ĉu vi scias jam detalojn pri tiu kurso?*

U.F. Ĝin organizas *BAVELO* (Baden-Virtemberga Esperanto-Ligo) kaj nomiĝas 18-a *BAVELO*-seminario kaj jarkunsido. Ĝi okazos inter la 13-a kaj 15-a de oktobro en Niederalfingen bei Aalen. Ĉi-jare estas organizota aparta kurso por studi la fakvortojn kun Wera Blanke. La alia grava aranĝo, la aŭtuna konferenco de *BELO* okazos en *Aschaffenburg* inter la 10-a kaj 12-a de novembro, kun instruista kaj asocia kunsido.

J.N. *Ĉu ekzistas ankaŭ korespondaj kursoj?*

U.F. De longa tempo ekzistas la koresponda kurso de *Ulrich Becker* en Berlino, sed tiun taskon baldaŭ transprenos alia instruisto.

J.N. *Ĉu estas io, pri kio vi ne estas tute kontenta koncerne de la instruado?*

U.F. Mi ĝojus pri pli intensa kunlaboro kun la instruistoj. Se mi ne devus ĉiam postkuri la kursdatojn, sed la kursgvidantoj sendus la datojn kaj la enhavon al mi. Mi ĝojus pri ĉiuj informoj pri iliaj metodoj, projektoj, ĉar mi pensas, ke estus tre valore havi superrigardon pri la diversaj metodoj. Tiam mi povus kompili liston de ĉiuj metodoj kaj materialoj, kaj pere de la oficejo mi povus transpreni la dissendadon. Mia celo estas, ke la oficejo funkciu kiel fakta informa centro de la instruistaro, ĉar tiam ni povus labori pli efike kaj kun reciproka profito.

Jozefo Németh

HUNGARIO

Ĉu paĉja lingvo? - REF '95

Malnova sperto, malnova devizo: Esperanto - edzperanto. Tio klarigas la originon de multaj esperantistaj familioj. Bone, bone, sed kio sekvos poste? Kiujn lingvojn uzu la familio, kiel parolu la infanoj? Ĉu E-o funkciu kiel patra, patrina aŭ gepatra lingvo? Jen kelkaj teoriaj demandoj, kiujn la vivo mem respondas. Ekzistas ja pluraj familioj internaciaj, kiuj trovis siajn proprajn solvojn. Kaj ekzistas familiaraj renkontiĝoj familiaj, kie ili povas interŝanĝi spertojn. Eĉ pli gravas, ke tie la infanoj havas okazon kune ludi, kanti, ekskursi, babiladi, amikiĝi... eventuale kvereli - nature, en la komuna lingvo. Ĉio ĉi estas efika rimedo kontraŭ izoliĝo, malcertiĝo, rezigno.

Sed esperantistaj familioj fondiĝas ne nur per internacia geedziĝo. Kelkaj verduloj konscie ekuzas E-on en sia hejmo. Por atingi la deziratan lingvan nivelon, ĉe etuloj ne sufiĉas konscio, necesas ankaŭ konsekvenco: almenaŭ unu el la gepatroj ĉiam parolu al ili nur esperante. Interesa, kvankam logika fenomeno: tiun rolon preskaŭ senescepte plenumas la patroj.

Renkontiĝo de Esperantistaj Familioj (REF) ĉi-jare okazis jam la 17-an fojon. Dank' al la sindona organiza laboro de Anna Besenyei, patrino de du ĉarmaj denaskulinoj, inter la 5-a kaj 12-a de aŭgusto ni povis pasigi neforgeseblan semajnon en apudlaga kampadejo de pitoreska hungaria urbo Tata. Partoprenis pli ol 20 familioj, (de)venintaj el - laŭ mia kalkulo - almenaŭ 14 landoj.

Tro striktan tagordon oni ne povis pretendi, ĉar multe da beboj kaj etaj infanoj ĉeestis. (Ankaŭ la aŭtoro helpis sian edzinon en la prizorgado de du

filinetoj - unu el ili grave malsana -, do vane vi atendas tre detalan kaj objektivan raportom.)

Vekiĝu, aliĝu! - familio Wacha varbis la publikon al matena gimnastiko. La juna knabo, Mateo ĉiutage fervore gvidis la ekzercojn, la volontuloj tamen iom post iom forvaporiĝis. Eble pro la malbeliĝinta vetero, eble pro elĉerpiĝo post lacigaj programoj, eble pro malfruaj enlitiĝoj, aŭ simple pro pigreco.

Post abunda matenmanĝo sekvis komunaj kantado, ludado, desegnado, pentrado, lertaj manlaboroj. Okazis ankaŭ konkursetoj por la infanoj, ili ekz. verkis fabelojn laŭ bildoj. Posttagmeze - kiam la etuloj plejparte ripozis - la pli aĝaj rigardadis la urbon, ekskursis al proksimaj fortikaĵoj, trovis la spurojn de prahomo 500.000-jara en subĉiela muzeo de vilaĝo Vértesszőlős; iris naĝi, flugigis kajtojn. Dimanĉe Krishna Kumar Bhatia prelegis pri Hindio, mi celebris diservon en la urbocentra preĝejo. Vespere ni ĝuis video-filmojn (pri Mazi, la plej populara monstro en Esperantujo, krome pri REF de la pasinta jaro), skeĉojn de Stefan MacGill, ŝipekskurson, bivakfajron, konversaciojn pli aŭ malpli seriozajn. Mi mencias nur unu el la pritraktitaj temoj: hejmaj terminoj. Kiel la familioj nomas ekzemple diversajn specojn de vindaĵoj, balanciloj, de modernaj kaj modaj manĝaĵoj (hamburgaĵo, puf-maizo), kion oni faras post uzado de la necesujo (forlavas ĝin).

Paralele kun REF, en la sama kampadejo okazis eĉ du junularaj aranĝoj: MEJS kaj IJS. Fakte, sprite farite! Pluraj iamaj REF-infanoj aktivadis jam tie, ofte eĉ ni miksiĝis inter ilin por iom rejuniĝi. Espereble ankaŭ ilin imponis la modelo de esperantistaj familioj. Tion mi nur konjektas ... sed tion certe scias, ke Amoro kun tre bona rezulto pafadis siajn sagojn inter ilin.

Johano Kirsch

ITALIO

Itala Interlingvistika Centro, Kooperativo de Literatura Foiro, Triesta E-Asocio bonvenigas al la

4-A MEDITERANEA KONFERENCO DE ESPERANTOLOGIO en Triesto,

28-31 oktobro 1995 dediĉita al la temo *La Esperanta leksikografio*: problemoj terminologiaj kaj frazeologiaj, la aktualigo de Plena Ilustrita Vortaro, la ĵusa aperigo de Esperanto-vortaroj franca/ itala/ germana, la pretigo de aliaj (bulgara/ hispana/ hungara), la frazeologiaj demandoj, la fakaj terminaroj, la rolo de niaj lingvaj institucioj ktp. estos traktataj de aŭtoroj kaj fakuloj dum ĉi tiu unika konferenco pri la farado de vortaroj en nia lingvo.
Loĝiga servo kaj postkonferenca turisma programo: *Triesta Esperanto-Asocio, via Crispi 43, I-34131 Trieste, Italio.* Pri la programo informas: *Kongresfako de LF-koop, c/o Esperanta PEN-Centro Pf. 117, H-1581 Budapeŝto, Hungario*

2.000.000 LIROJ POR UNIVERSITATA STUDO **Premio!**

Triesta universitato, kune kun la fame agema Triesta E-Asocio, lanĉas ekde 1994/95 la premion *Kastelo de Miramar*. Ĝi ĉiujare estos asignata al doktora

disertacio, pridiskutita ĉe italia universitato, pri la jenaj temoj: lingva problemo, interlingvistiko, E-o kaj esperantologio. (Nu, la titolo „doktoro", en sia simpla formo, en Italio ekvivalentas al la magistra; en la itala la premio estas *premio di laurea*). La unua premio Miramar estos aljuĝita fine de 1995 inter disertaĵoj ellaboritaj dum la akademia jaro 1994/95 pri la temo: La lingva problemo kaj adopto de neŭtrala lingvo.

La premio valoras 2.000.000 ITL (ĉ. 2000 guldenoj!).

Tiamaniere oni intencas favori la studadon kaj esplorojn pri lingvo internacia, donante krome la eblecon pliprofundigi la argumentojn laŭ lingvistika, socia, ekonomia kaj politika vidpunktoj. Imitinda ekzemplo, ĉar ja draste mankas en naciaj lingvoj akademiaj pritraktoj pri E-o. Por pli da informoj: *Triesta E-Asocio, C.P. 601, I-34100 Trieste-Centro, Italio.*

Bruno Masala (laŭ La Gazeto, aprilo 1995)

SEMINARIO EN BOLSENA

De la 29-a de aprilo ĝis la 1-a de majo okazis en la ĉelaga urbeto Bolsena, 100 km-ojn norde de Romo, vigla seminario pri la temo: „Esperanto-instruado: metodoj kaj materialoj". La seminarion organizis la roma katedro de la Itala E-instituto, do la trideko da partoprenantoj venis ĉefe el centra Italio, sed ankaŭ pluraj norditaloj kaj kelkaj suditaloj ĉeestis la kunvenon.

La seminarion malfermis la interesa prelego de d-ro *Renato Corsetti* pri la instruado de la fremdaj lingvoj en la historio de la sumera ĝis Esperanto. Corsetti klarigis, ke la t.n. tradicia metodo, t.e. la gramatika metodo estas relative moderna, ĉar ĝi plene disvastiĝis nur en la 18-a kaj 19-a jarcentoj, dum la „moderna" rekta metodo fakte estas ege malnova, ĉar ĝi estis uzata jam de la antikvaj egiptoj. La sekvan tagon okazis prelego de *Elisabetta Formaggio* pri la instruado de Esperanto en la elementaj lernejoj. Magistrino Formaggio, kiu, interalie, estas la aŭtorino de *Ludu kun ni!*, propedeŭtika lingvokurso por infanoj aperinta en 1994, prezentis sian metodon, evidentiganta la multajn valorajn rezultojn de E-instruado al infanoj.

Poste *Alessandra Di Donato* prezentis sian metodon instrui E-on al malgrandaj infanoj. Ŝia metodo baziĝas precipe sur la fantazio de la instruisto kaj la helpo de ludiloj kaj bildoj. Ankaŭ du aliaj elementlernejaj instruistoj, *Carlo Bourlot* el Torino kaj *Leonardo Pampaloni* el Florenco rakontis siajn spertojn en la E-instruado al infanoj. La lastan tagon okazis prelego de *Pier Luigi Cinquantini*. Interalie, Cinquantini donis al la ĉeestantoj mallongan ekzemplon de Cseh-leciono kaj tio estigis viglan debaton pri tiu ĉi metodo. Fine, *Michaela Lipari*, UEA-estrarano parolis pri kulturo kaj pri la problemoj de la dua- kaj tria-gradaj kursoj. Oni vigle diskutis pri la materialoj kaj pri la maniero gvidi kursojn en Italio kaj oni proponis, ke la Itala E-Instituto ĝisdatigu la kursprogramojn. Antaŭ ol ni veturis hejmen, ni ĉiuj esprimis la deziron, ke tiu renkonto estu komenco de serio da fruktodonaj kunvenoj.

Fabrizio Pagliaroli

KROATIO

Eŭropo en la lernejo

- konkurso sub aŭspicio de la Eŭropa Konsilantaro kaj la Eŭropa Komunumo

Kroatio la unuan fojon partoprenis la konkurson, en diversaj branĉoj. Ĉefaj celoj de la konkurso: veki la konscion de la eŭropanoj, substreki la gravecon de la eŭropa klerigado, instigi la komunikadon inter la eŭropaj lernejoj kaj direkti la atenton de la lernantoj al la problemoj de la unuiĝonta Eŭropo. La ĉi-jara ĉeftemo: „estonteco profunde mergita en la histori-rememoron: defio por juna eŭropano". La temo ligiĝas al la kampanjo de la Eŭropa Konsilantaro kontraŭ rasismo, ksenofobio, antisemitismo kaj maltoleremo. La pritaksado okazis en regiona kaj landa niveloj. La landan komitaton atingis ĉ. ducent verkoj en ĉiuj kategorioj. Kroata Esperanto-Unuiĝo instigis siajn junajn membrojn partopreni la konkurson. De la regiona nivelo oni plusendis 16 E-verkojn al la nacia. Inter la 86 premiitaj verkoj fine troviĝis kvar esperantaj el tri urboj: *Elizabeta Pajk, Nataša Galiĉ, Silvija Brezak* kaj unu grupa verko. La premiitojn akceptis ankaŭ la vicurbestro de Zagrebo, *Bozo Biškupic*. Ni estas tre scivolemaj, ĉu ankaŭ en aliaj landoj partoprenis la konkurson e-istoj? Ni tre volonte interŝanĝos la spertojn. Adreso de KEU: *Sveti Duh 130, HR-10000 Zagreb, Kroatio*.

Fine de junio, ĉ.j. oni organizis solenan transdonon de la diplomoj al la sukcesintoj ĉe la *internaciaj konkursoj István Szerdahelyi* kaj *Ivo Lapenna*.

Post la disdono de la diplomoj, du junulinoj, *Martina Gazdek* kaj *Irena Škreblin* per bela muziko regalis centon da vizitantoj.

Marija Beloševic

NEDERLANDO

La Nederlanda Grupo de Geinstruistoj pri Esperanto (NGGE) organizas **porinstruistan seminarion** por la membroj de la ILEI-sekcioj en Nederlando kaj najbaraj landoj.

La seminario estas planita en la semajnfino de la 15-17-a de marto 1996 kaj okazos en la naturamika domo *Eikhold* en la urbo *Heerlen* en la sudo de la nederlanda provinco *Limburgo*.

La temoj de la seminario estos: la instruado al rifuĝintoj, aŭdvidaj instrumetodoj. La enkondukontoj de tiuj temoj estos poste anoncataj.

La seminario komenciĝos vendred-posttagmeze. La domo disponas pri 2-personaj ĉambroj kaj kunven-salonoj kaj situas en bela regiono. Ĝi estas facile atingebla per publika transporto kaj propra aŭto.

La partoprenkotizo estas 150 NLG, kiu inkluzivas du tranoktojn, du maten-, du tag- kaj du vespermanĝojn, kafon/teon kaj la seminari-dokumentojn. Interesitoj povas peti aliĝilon ĉe la sekretariejo de *NGGE, Middenweg 587, NL-1704 BH Heerhugowaard, Nederlando, tel. +31 2207 17918.*

Hans ten Hagen

NORVEGIO

El la Jarraporto 1994 de Norvega Esperantista Ligo

Fine de la jaro NEL havis 11 klubojn kun entute 360 membroj. Atilio Orellana Rojas kaj lokaj fortoj gvidis 6 kursojn kun entute 40 lernantoj. Kursoj estis en Oslo kaj Tromsø. Kunlabore kun NEFA kaj danke al fervora laboro de Rolf Bergh, eblis aŭskulti la plibonigitan radiokurson de Jon Rømmesmo pere de *Radio Hamar, Radio Hedmark, Solungen bygderadio, Radio Korgen, Radio Helgeland, Radio Torghatten* kaj *Radio Vefsn*. En la radio kaj televido oni okfoje povis aŭdi intervjuojn kaj menciojn pri E-o. La korespondan kurson de *Folkets Brevskole* partoprenis entute 7 kursanoj. En 1994 neniu kandidato plenumis ekzamenon de NEL. Unu membro trapasis elementan ekzamenon internacian. Pri lerneja instruado: Johan Hammond Rosbach prelegis kadre de *Daghøyskolen*, Sarpsborg por 18 aŭskultantoj kaj en la liceo *St Olav* por 14 gelernantoj. Komisiono konsistanta el Bjørn Thuv, Odd Tangerud kaj Otto Prytz, ellaboris programon por instruado de Esperanto ĉe la instruista altlernejo de Bergen. La programon devos aprobi la Ministerio pri edukado por ke ĝi realiĝu. *(laŭ Norvega Esperantisto 2/1995)*

RUSIO

Pedagogia sperto el Moskvo: nur intensan kurson!

Mia trijara sperto en Moskvo montras, ke NUR ekspres- aŭ duonekspres-metoda E-instruado donas grandan elcenton da kursfinintoj. La kurso okazu 4-6-foje semajne, ne malpli ofte. Mi klarigas la aferon. Post priesperanta prelego ĉe kursanoj aperas maksimuma entuziasmo lerni la lingvon. Poste la novaj informoj el la ĉiutago surfalas la saman cerbon, kaj post kelkaj semajnoj la entuziasmo pri E-o malkreskas ĝis plena velko. Tial necesas laŭeble rapide uzi la kulminon de entuziasmo por plene instrui la lingvon. Post tio la E-klubo kaj la asocio devas tuj denove levi priesperantan entuziasmon per interesa kluba vivo, korespondado, servoj, E-renkontiĝoj, E-kulturo k.s.

Anatolo Gonĉarov (laŭ Eksciu, ke..., februaro 95)

UKRAINIO

En Slavjansk, Ukrainio dum kelkaj jaroj funkciis aparta E-katedro kaj vasta E-instruado en la Instituto pri Manaĝerado (privata altlernejo, nun jam nomata Akademio), kiu eldonis eĉ apartan E-gazeton. La revuo „E-Centro informas" fakte mortis. La kaŭzoj multis. Unue - ĝia redaktoro, A. Gonĉarov edziĝis kaj translokiĝis en Krimeon, poste - Internacia Akademio pri Administrado en Slavjansk akceptis malmultajn studentojn en 1994 kaj tial ĝi ne bezonis E-instruistojn kiel antaŭe. La E-katedrestro G. Ŝilo fuĝis Moskvon kaj nun rektoras en „Eŭropa Instituto de Juro". Finfine jenas la fakto: La E-katedro en Slavjansk malaperis. Mi restis la sola E-instruisto en la Akademio. Kaj eĉ tio ne povus okazi, bonŝance la rektoro ege estimis mian patron M. Popov, kiu

mortis en 1994. (M. Popov estis vaste konata e-isto el urbo Berdjansk - la red. de Eventoj).

A. Popov (el Eventoj 0083.)

„Ŝanĝigas la adreso de HELIANTO, informilo de Ukrainia Esperanto-Asocio, unusola periodaĵo, kiu daŭre ekzistas en nia lando" - informis nin la redaktoro. „La floro ne povas kreski sen sunradioj de via atento kaj kunlaboro." Abono: 5$ al UEA-kodo nivo-p, aŭ 10 IRK, aŭ vialandaj poŝtmarkoj je la sama sumo, aŭ interŝanĝe, abono de alia periodaĵo. Adreso: *UA-263018, Ukrainio, Luck-18, p.k. 26.* Senpagan provnumeron vi ricevos kontraŭ simpla peto."

Niko

UZBEKIO

NdlR - Nia redakcio ricevis fragmenton de la nova lernolibro de Eŭgeno S. Perevertajlo. Tiel li skribis en sia letero:

„jen estas paĝoj el mia nova lernolibro por la unuaj klasoj de la lernejo. Mi kompilis la unuan parton konsistantan el 12 lecionoj. Ĝi estas prespreta kun la literoj kaj desegnaĵoj. La lernolibron eblas eldoni en ajna lingvo, ĉar la reguloj kaj konsiloj por la instruistoj kaj ankaŭ la taskoj por la ekzercoj estas E-lingvaj. Mi serĉas eldonanton. Kiu povas helpi min?" *Adreso de la aŭtoro: Eŭgeno S. Perevertajlo, ab/k 140, Poĉtamt, UZ-700000 Taŝkento, Uzbekio, CIS*

Por via notlibro

Internacia Konkurso Honore al I. Szerdahelyi

Regularo por la lernojaro 1995/96

1. La konkurso ekestis por lernejanoj ĝis la aĝo de 19 jaroj, sed pasintjare ĝi malfermis siajn pordojn antaŭ ĉiuj konkursemaj esperantistoj (legantoj de Eventoj kaj aliaj E-periodaĵoj, kursanoj, soluloj ktp.).
2. Por lernejanoj la konkurso havas du kategoriojn: ambaŭ ampleksas lernantojn malpli ol 19-jarajn. En la 1-an eniras ***komencantoj***, t.e. personoj kiuj lernas E-on mapli ol du jarojn, la 2-an formas ***progresintoj***. En ambaŭ kategorioj ekzistas du grupoj: apartajn konkursajn listojn formas la geknaboj ĝis 14-jaraj, kaj la pli aĝaj, kvankam ili solvas la samajn taskojn. La ***plenaĝuloj*** (3-a kategorio) ricevas la taskofoliojn de la progresintoj kun kelkaj eventualaj modifoj.
3. La konkurso ***daŭras unu lernojaron****: de oktobro ĝis majo*. En la daŭro de la lernojaro aperas entute 7 taskfolietoj por ĉiuj tri kategorioj. La unua estas sendita al tiu lernejo aŭ individuo, kiu ĝin petas letere kaj almetas poŝtmarkon aŭ internacian respondkuponon por afranki la sendotaĵon. Ĉiu folieto enhavas 7 ĝis 9 simplajn taskojn, per kies senerara solvo *estas akireblaj ĉiufoje 20 poentoj*. La solvoj estu skribitaj en E-o sur simpla blanka paperfolio *en la formato de IPR* (A/5) kaj estu sendataj al la adreso donita malsupre sur la taskfolieto mem *(redaktinto de la koncerna taskofolieto)*.
4. En la unuaj du kategorioj, almenaŭ sur la unua solvofolio, la E-instruisto atestas per subskribo kaj la stampo de la lernejo, ke la konkursanto estas lernejano. La solvofolio ĉiam surhavu ***la legeblan, kompletan nomon***, la kategorion (**K**=komencanto, **P**=progresinto, **L**=leganto de E-revuo) kaj la grupon (**B**=bazlernejano, **M**=mezlernejano, **Pl**=plenaĝulo) de la konkursanto. Por konkursantoj de lernejoj sen E-instruisto *la unuan fojon* estas bezonataj lerneja stampo kaj la subskribo de la klasestro.
5. La instruisto de E-o kolektas ĉiujn solvofoliojn de sia lernejo kaj en komuna koverto sendas ilin ***ĝis la indikita limdato*** *(validas la poŝta stampo)* al la adreso donita malsupre sur la koncerna taskfolio mem. (Solulo mem sendas siajn solvojn.) Por rericevi la korektitajn solvojn kaj por ricevi novajn taskfoliojn la konkursanto aŭ instruisto sendas kun la solvoj poŝtmarkojn aŭ internacian respondkuponon por afranki la respondon. (Lernejoj de ekssocialismaj landoj povas kovri la poŝtkostojn laŭ anticipa interkonsento!) Kun la korektitaj solvoj oni ĉiam ricevas la ĝustan solvon de la antaŭa taskaro kaj la kompletan liston de la konkursantoj. La nomoj de la plej sukcesaj konkursantoj jarfine aperas en la revuo *Eventoj*, kaj estas voĉlegataj ĉiufoje en la E-programo de la *Hungara Radio Kossuth*.
6. Post la lasta numero la plej sukcesaj konkursintoj estos ***premiitaj***.

NdlR - Pri la konkurso vi povis legi en la 1-a ĉi-jara numero de IPR. Tiuj, kiuj volas partopreni la konkurson, skribu tuj al adreso: ILEI-Komisiono pri Lernejaj Konkursoj, Géza Kurucz, H-6000 Kecskemét, Nyíri u. 11. Hungario

MAZI estas nekopiebla

Laŭ la informo de Tomasz Wojciechowski, gvidanto de la eldonejo TOMMY pro la vastiĝanta piratado de videofilmoj la MAZI-kasedo estas registrita per nova, antaŭnelonge inventita kodiga sistemo, kiu plene malebligas la kopiadon. La kopiita materialo havos difektitan son-trakon kaj la filmo estos striita same kiel ĉe koditaj satelitaj elsendoj. Mi informas pri tio pli frue, por ke oni ne esperu pri akiro de kopiita varianto. *Andrzej Pettyn* (el *Eventoj* 0081.)

NdlR - Laŭ la informoj de nia redakcio dum la kopiado ankaŭ la originala bendo povas difektiĝi.

„Carson" elĉerpiĝos post du jaroj

Dum dek unu jaroj, ***Eduka Fondaĵo Carson*** el Kanado distribuis pli ol 60 000 kanadajn dolarojn por subteni edukajn projektojn en multaj landoj. Nun la direktoroj decidis elĉerpi la tutan sumon de la Fondaĵo dum la venontaj du jaroj. Ili kuraĝigas esperantistojn kun bone elpensitaj proponoj skribi per petformularo al: *Eduka Fondaĵo Carson, 1339 Hamilton St. N. W., Calgary, Alberta, Kanado T2N 3W8.*

La Fondaĵo jam subtenis lernolibrojn, vortarojn, korespondajn kursojn, stipendiojn por ĉeesti kursojn, instruvojaĝojn, varbobroŝurojn kaj la videbendan kurson Mazi. Lastatempaj projektoj subvenciitaj inkluzivas eldonon de Esperanto-rokmuzika kompaktdisko (dua volumo), novajn lernolibrojn por german- kaj por sinhal-lingvanoj, kaj kursojn en pluraj landoj de Centra Ameriko. *Anne Neave*, kuratoro (el *Esperanto*, julio-aŭgusto 1995)

Terminologio

Maŭro La Torre serĉas kunlaborantajn kompetentulojn por (iom post iom) prilabori fakterminaron en la kampo de instruado (instrusistemoj, instruteknologio, pedagogio, ktp.), aŭ la modelo pridiskutita en Porvo/Övik (Finnlando) dum la jus okazinta ILEI-Konferenco. Interesatoj kontaktu lin (aŭ IPR-redaktejon, aŭ ILEI-sekretariejon) ĉe la jena adreso: Maŭro La Torre, Dipartimento di Scienze dell' educaizone, Terza Universita' di Roma, Via del Castro Pretorio, 20, IT-00185 Roma. Retpoŝto: <m.latorre@educ.uniroma3.it>. Fakso: 0039-6-4452642. Telefono: 0039-6-4957805.

Instruhelpiloj, pedagogiaj novaĵoj
en la libroservo de UEA

Comprehensive English-Esperanto dictionary. Peter Benson (1940). El Cerrito: ELNA, 1995. 607 p. ISBN 0-939785-03-x. 22 cm. La plej ampleksa kaj ĝisdata vortaro angla-Esperanta, kun ĉ. 28.000 kapvortoj. 39,00 gld.

Dansk-Esperanto ordbog. Elisabeth kaj Harald Grønborg. Odense: Eget, 1949. 387 p. 21 cm. Bind. Daŭre la plej granda dana-Esperanta vortaro (pli ol 10 mil kapvortoj). 15,00 gld.

Dictionar esperanto-român. Ignat F. Bociort. Ana Brutiu k.a. Timisoara: Eurobit, 1995. 276 p. ISBN 973-9201-04-0. 27 cm. La unua granda Esperanto-rumana vortaro, kun ĉ. 10.000 kapvortoj. 18,00 gld.

Dulingve - pli simple („Kajeroj por multlingveco: 2."). Ernő Csiszár (1940). Roterdamo: UEA, 1995. 86 p. 29 cm. La unua libroforma prezento de denaska edukado per du lingvoj el kiuj unu estas Esperanto. 10,50 gld.

Esperanto: Lehrbuch der internationalen Sprache. Zlatko Tišljar k.a. Trad. Karl Hirmann k.a. Maribor: Inter-Kulturo, 1995. 65 p. 21 cm. La Zagreba metodo por germanlingvaj komencantoj. 9,90 gld. (La saman verkon vi povas aĉeti ankaŭ en slovena lingvo en la trad. de B. Levaĉiĉ.)

Esperanto-Wörterbuch. Ulrich Matthias (1966). Neckerhausen: E-Jugend Heidelberg, 1995. 45 p. 21 cm. Bazaj gramatiko kaj vortaro por germanlingvanoj. 3,30 gld.

Hungaraj skizoj. Ungarische Skizzen. Magyar vázlatok. Franz-Georg Rössler (1949). Dudenhofen: Ponto, 1995. 63 p. ISBN 3-9803793-3-7, Ilustraĵoj de Rita Rössler-Buckel. Trilingva: germana-Esperanta-hungara. Hungariaj vojaĝ-spertoj. Hungara varianto: József Németh. 16,80 gld.

Lingvaj respondoj. L.L. Zamenhof. Editoris Gaston Waringhien. Vieno: Pro Esperanto, 1995. 10+130 p. ISBN 3-85182-031-2. 24 cm. Represo de la sesa eldono el 1962. 24,00 gld.

Lingva orientado per Esperanto en la unua-grada lernejo. Gvidlibro por instruistoj. Elisabetta Vilisics Formaggio (1934). Roma: E.R.A., 1995. 79 p. 21 cm. Dulingva: E-itala. 16,50 gld.

Ludu kun ni! Propedeŭtika lingvokurso por infanoj. Elisabetta Vilisics Formaggio (1934). Roma: E.R.A., 1994, 150 p. 30 cm. 33,00 gld.

Vivi estas miri. Lectures pour débutants. Claude Piron (1931). Vienne: Pro Esperanto. 1995. 112 p. ISBN 3-85182-026-6. 23 cm. Kvar facilaj rakontoj kun paralela franca teksto kaj abundaj klarigoj. 21,00 gld.

Mendu ĉe la Libroservo de UEA, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando. Bonvolu atenti ke al ĉiuj netaj prezoj de libroj sendotaj al adresoj en Eŭropa Unio aldoniĝas 6 % pro la aldonvalora imposto. Al ĉiuj netaj prezoj aldoniĝas 10 % por sendokostoj. Minimumaj sendokostoj estas 5 gld.

NOVA ELDONAĴO DE ILEI:

JON RØMMESMO

FANTAZIAĴOJ kaj KANTOJ por INFANOJ

Libro de 56 kantoj kaj 17 rimaĵoj por junaj infanoj (unuavice 4-10-jaraj) , ilustrita kun muziknotoj, 100p., A4-formato. Prezo ĉe UEA: 15 NLG.

Ĝoje ni anoncas la plej novan eldonaĵon de la Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI) — unika eventuale ne nur pro tio, ke ĝi estas tre verŝajne la unua libro en Esperanto lanĉita en la unua semajno post Universala Kongreso!

La libro havas plenkoloran kovrilon; la granda formato estas pli facile manipulebla flanke de infanoj kaj ĉiuj tekstoj aperas majuskle, ĉar etuloj pli frue lernas rekoni tiajn literojn. Kelkaj kantoj estas originalaj, la plimulto estas tradukoj, grandparte sed ne nur el norvegaj aŭ nordiaj infan-kantoj. Do, multajn novajn vi trovos inter la konataj. Iuj kantoj specife helpas pri difinitaj lernendaj lertoj, ekz. nombri, lerni la Esperanto-alfabeton, la kolorojn ktp.

Al multaj **gazetoj** kaj **radio-stacioj** ni sendis ekzemplerojn por mencio aŭ recenzo. Se iu redaktoro ne ricevis la verkon sed volonte recenzos ĝin, bv. peti ekzempleron tiucele.

De **libroservoj, lernejoj kaj ILEI-membroj** ni invitas mendojn per la suba mendilo kaj ofertas favorajn eblecojn tiucele. Ni kaptas la okazon re-oferti niajn aliajn eldonaĵojn. Niaj prezoj inkluzivas surfacajn sendokostojn.

Titolo	Unu ekz.	Ekde 3 ekz., po	Ekde 9 ekz., po
Kantlibro Rømmesmo	15 NLG	10 NLG	8 NLG
Tendaraj tagoj I	12 NLG	8 NLG	6 NLG
Tendaraj tagoj II	15 NLG	10 NLG	8 NLG
Tendaraj tagoj III	18 NLG	12 NLG	9 NLG
Tend. tagoj kompleto	39 NLG	26 NLG	21 NLG
Lingvo-instruado	24 NLG	18 NLG	15 NLG

Koran dankon!
Stefan MacGill, komisiito pri eldonado.

— ✂ .. — tondu — —

MENDILO

Sendu al ILEI, pf. 193, H-1368 Budapest.

Ni mendas _____ ekz. de *Fantaziaĵoj kaj Kantoj por Infanoj.* Sume: _____NLG

_____ ekz. *Tendaraj tagoj, kajero I* _____

_____ ekz. *Tendaraj tagoj, kajero II* _____

_____ ekz. *Tendaraj tagoj, kajero III* _____

_____ ekz. *Tendaraj tagoj, tri-kajera kompleto* _____

_____ ekz. *Teorio kaj praktiko de lingvo-instruado* _____

SUME: _____

Ni fakturos la librojn en guldenoj, krom se vi petos aparte. Pagojn vi povos fari al nia konto *ilek-a* ĉe UEA, aŭ al nia kasisto en Svedio. La fakturo liveros plenajn pag-informojn.

Nomo: _____ Subskribo:_____

Dato:_____

Adreso kien sendi la librojn:

_____

_____

_____

Aliaj eldonaĵoj

Post plurjara laboro aperis **Esperanta-hungara minimum-vortaro de Géza Kuruczo**. Ĝian kernon formas la 7 unuaj vortgrupoj de la Baza Radikaro Oficiala (B.R.O.). Sed tio estas nur la bazo, ja la praktiko montris, ke estas utile prezenti aparte per okulfrapaj ekzemploj la gramatikon de la lingvo, ties afiksaron, prepoziciojn, tabelvortojn kaj la plej oftajn mallongigojn. Do, ĉion ĉi vi trovas en la vortareto, 1237 vortojn, vorterojn, sur entute 36 malgrandaj paĝoj. La jus eldonita vortareto donas la leksikan trunkon de nia lingvo kaj ankaŭ la gramatikan karakteron de ĉiu vorto.
Vi povas ĝin aĉeti ĉe *József Baksa, pf. 263., HU-8901 Zalaegerszeg.*

Kun 12 religiaj kantoj kaj orgenmuzika akompano de Miklós Teleki aperis la **kasedo de Anjo Amika** (Anna Lászay) kun la titolo *Dimanĉa koncerto.* Aĉetu ĝin ĉe *LF-koop, CP-232, CH-6830 Chiasso 1, Svislando. Prezo: 18 CHF.*

Aŭtune aperos la CSEH-memorlibro

Fine de oktobro aperos la Cseh-memorlibro, dediĉita al la 100-a naskiĝdatreveno de la plej granda apostolo de Esperanto-instruado kaj propagandado.

La memorlibron redaktas Katalin Smidéliusz, Cseh-instruisto kaj kunlaborantino de la Internacia Esperanto-Instituto de Hago, fondita de Andreo Cseh.

En la memorlibro aperos ĝis nun ne-publikigitaj familiaj fotoj, dokumentoj kaj leteroj de kaj pri Andreo Cseh; homproksimaj rememoroj de niaj samideanoj, konintaj kaj renkontintaj la grandan pedagogon, estintaj forte influataj de liaj personeco kaj metodo. Katalin Smidéliusz sukcesis igi rememori niajn gravulojn: Marjorie Boulton, Humphrey Tonkin, Petro Rulofido, Cathy Schulze, Mila van der Horst-Kolinska, Ĝiĝi Harabaĝiu, C. Støp-Bowitz, May Bijleveld, Ramona van Dalsem-Huijts, Éva Farkas-Tatár, Ferenc Jáki, Duncan Charters, Pierre de Smedt; esprimas sian opinion pri la famaj Cseh-metodo, kurs- kaj Cseh-instruistoj Henry Boyet, Herbert Mayer, Stefan MacGill, Hans ten Hagen, Atilio Orellana Rojas; per konkursaĵoj kontribuas Mónika Molnár, Katerína Bodnárová, Georgo Flender, Aurelia Sokol. Artikoloj el la tridekaj jaroj helpas havi imagon pri la propagandista rondvojaĝo de Andreo Cseh, poemoj verkitaj al li kortuŝe respegulas la amon de liaj kursanoj.

La redaktadon de la libro helpis ankaŭ Ed Borsboom, kiu de jaroj okupiĝas pri la verkado de biografia libro de Andreo Cseh.

La eldonado de la memorlibro estas privata entrepreno de la redaktinto, helpata per antaŭmendoj de IEI, monhelpo de Universala Ligo kaj kelkaj fervoraj unuopaj apogantoj. Tamen la eldonkvanto povos esti nur limigita. **Via kontribuo** por grandigi ĝin **kaj**/aŭ **antaŭmendo** por certe ricevi el la eldonaĵo **estas bonvenaj**.

Kontaktadreso: Katalin Smidéliusz, H-9700 Szombathely, Apáczai sétány 10., Hungario,Tel.: +36 94-320-313, Universitata fakso: +36 94-312-248, E-pośto: smidik@fs2.bdtf.hu

Atentigo!

En sia 155-a numero (junio 1995) la altranga revuo Literatura Foiro dediĉis la rubrikon Datrevene al la memoro de Andreo Cseh, nia elstara pedagogo. La memoradon helpas interesaj artikoloj de Ed Borsboom, Audrey Childs-Mee, Katalin Smidéliusz kaj Jaroslav Marík.

Serĉu, legu kaj kunmemoru!

Vizito en zoologia ĝardeno kie la bestoj parolas Esperanton / *Eur Valeadenn el liorz zologiel leh ma komz al loened Esperanto* estas la titolo de la kun fotoj ilustrita, dulingva libro, kiun sendis al mi s-ro *Frédéric Le Magadure*. Jene mi citas el lia letero: „mi verkis [la libron] por la lernantoj de mia lasta E-kurso en mia iama elementa lernejo. La fotojn mi jam havis de pluraj jaroj, kiam mi partoprenis, kun aliaj gelernantoj, en la internaciaj infanrenkontoj en Grésillon, la kara hejmo de esperantistoj. Venis al mi ankaŭ la ideo valorigi mian unuan lingvon, la bretonan. Mia amiko, *André Le Mercier*, esperantisto, fleganto kaj instruisto de la bretona lingvo, helpis min tiucele. Li ankaŭ eldonis la libron. Dankon al li! Espereble aĉetos ĝin kelkaj dekoj da klasoj, kie la instruado okazas duone en la franca, duone en la bretona. Tiel la gelernantoj kaj la instruistoj devige havos sub la okuloj Esperanto-teksto; ĉu ĉiuj restos fermitaj al nia lingvo? Espereble ne! Tial mi proponas al vi eldoni tiun libreton en Esperanto kaj en via propra lingvo; se ĉi-lasta estas malvaste parolata, la afero estos des pli interesa: kiel mi, trafos du celojn per unu frapo." - La aŭtoro proponas, ke oni verku similajn dulingvajn librojn por tiel havigi al niaj komencantoj facilajn kaj interesajn legaĵojn, kaj por montri al la neesperantistoj la viglecon de nia komuna lingvo.

Lia adreso: *Frédéric Le Magadure, 23, Rue Jules-Ferry, F-56700 Hennebont*

J.N.

ABON-TARIFOJ por **Juna amiko** por 1996

La guldena tarifo por *Juna amiko* restis senŝanĝa dum tri jaroj. ILEI nun devas altigi ĝin, sed ne tiom, kiom ni planis, dank' al nova kunlaboro kun *Infanoj ĉirkaŭ la mondo*. Ni imagas konservi la guldenan kaj firm-valutan tarifon je la nova nivelo sen altigo dum almenaŭ tri jaroj. Iuj numeroj enhavos 36 paĝojn, ne 32 kiel ĝis nun.

La tarif-zonoj spegulas pagi-povon kaj restas kiel antaŭe. Daŭre ni ofertas grandajn rabatojn por kvantaj mendoj, sed nun nur en tri kategorioj. Se iu mendas pli grandan kvanton (ekde 20 ekz.) oni povas negoci eĉ pli grandan rabaton!

Krom per speciala interkonsento, abonoj validas por kalendara jaro. Ĝis la 30a de septembro 1995 (aŭ la apero de numero 95/3) perantoj akceptos abonojn por 1996 laŭ la tarifoj de 1995. Kun numero 95/3 venos varbilo sur aparta folio, tiel ke ĝi ne forrabos gazet-spacon. Venos ankaŭ speciala bild-rakonta folio per kiu legantoj povos ekinstrui Esperanton al siaj amikoj!

(La valuto-mallongigoj estas laŭ la oficiala normo de ISO.)

Tarifo 1	**NLG**	**SEK**	**NOK**	**DEM**	**FRF**	**BEF**	**GBP**	**CHF**	**FIM**	**ATS**
Unu ekz.	19	85	75	17	55	320	7	14	50	120
2-9 ekz., po	15	65	60	13	45	260	5,50	10	40	100
ekde 10, po	10	45	40	9	30	200	4	8	30	70

Tarifo 1	**ESP**	**ITL**	***Aere:***	**USD**	**CAD**	**AUS**	**NZD**	**JPY**	**ILS**
Unu ekz.	1000	18.000		12	15	15	15	1100	30
2-9 ekz., po	800	14.000		9	11	11	11	900	24
ekde 10, po	600	10.000		6	8	8	8	600	16

Tarifo 2	**Latin-ameriko, Koreio.**		**Tarifo 3**	**Rusio, Pollando, Ĉeĥio, Irano ktp.**			
Aere	**NLG**	**USD**	**NLG**	**DEM**	**USD**	**HUF**	**IRPK**
Unu ekz.	9	6	7	6	5	500	7
2-9 ekz., po	7	4,50	5,50	4,50	4	400	5
ekde 10, po	5	3	4	3,50	3	300	4

Tarifo 4	**Orientaj najbaroj de Hungario**					**Hungario**	
	NLG	**DEM**	**USD**	**HUF**	**IRPK**	**HUF (Unu numero surloke)**	
Unu ekz.	5	4,50	3,50	350	5	300	50 HUF
2-9 ekz., po	4	3,50	3	300	4	240	40
ekde 10, po	3	2,50	2	200	3	180	30

Memoru, ke nia numero 95/4 estos nia 75a!

Stefan MacGill, redaktoro

Leterkesto

Kara kolego, estimata Redaktoro!

Nia revuo - IPR - estas, laŭ miaj spertoj, inter la plej interesaj por-instruistaj fakrevuoj. Estas certe multaj landoj, kie la instruistoj volonte konatiĝus kun IPR, ĝia riĉa, varia enhavo altiros ilin. Jes - mi asertas - , malgraŭ ilia ege tempo-bezona profesio, kiu apenaŭ lasas energion kaj horojn okupiĝi pri la perfektiĝo. Ĉu ili legas fakrevuon? La ne-esperantistoj? Mi proponas: ni

proksimiĝu al ili! Necesus aperigi etajn resumojn de la pli gravaj artikoloj (ne strikte Esperanto-rilataj) - en kelkaj vaste konataj lingvoj: angle, germane, ruse (aŭ en alia slava lingvo). Aldonu fine: „Pri la vin interesanta artikolo petu tradukhelpon de kolego konanta Esperanton."
Plurlingvaj resumoj estas ĝenerala kutimo tra la scienca revuaro. Direktoroj kaj aliaj ĉefoj de lernejoj kaj pedagogiaj institucioj povos ekinteresiĝi pri IPR, pro ĝiaj valoroj deziros regule observi ĝin - sekve: aboni. Kolegoj povis iniciati aperigon (elpendigon) de rimarkindaj artikoloj. Ktp. Ni ne timu pro „ĉeesto" - utiligo - de la angla k.a. Ni estu realismaj kaj ne neglektu la pli rapidan ĉevalon, kiu ja povos tiri nin. Esperanto helpas ellerni aliajn lingvojn. Nun la aliaj lingvoj helpu nin! Amike: *Eŭgeno S. Perevertajlo, Taŝkento, Uzbekio*

Alvoko al la sekciestroj

En la dua junia numero de Eventoj titolpaĝe aperis la kontrakto inter ILEI kaj Eventoj, kiun subskribis la 26-an de marto 1993 *Stefan MacGill* kaj *László Szilvási*. Samtempe mi ricevis leteron de la redaktoro de Eventoj kun la peto, ke mi petu informojn de la ILEI-sekciestroj, ĉu ili sukcesis plenumi la kontrakton en sia lando? Ĉar la kontrakto aperis tiutempe, en la 3/93-a numero de IPR, mi nun ripetas tiujn punktojn, pri kiuj Eventoj aparte interesiĝis:

„2.1. ILEI per ĉiuj siaj rimedoj instigas siajn membrojn, la E-kursgvidantojn, la E-instruistojn aboni al la gazeto Eventoj, kiu servos ankaŭ kiel rapida informilo inter la ILEI-membroj en la intervalo de du IPR-numeroj.

(NdlR - Dum la Konferenco de ILEI en Finnlando la Komitato denove petis la ILEI-anojn aboni la E-gazeton "Eventoj".)

2.2. ILEI per siaj rimedoj (konferencoj, seminarioj, IPR, ktp.) instigas siajn membrojn, ke en ĉiu kurso oni „instruu" ankaŭ movadajn konojn.

2.7. Eventoj certigas la eblecon por ILEI aperigi operativajn, rapidajn informojn al siaj membroj." *[La demando: Ĉu oni sendis informojn?]*.

Al la lasta demando, kiu samtempe estas peto, mi aldonas nun mian propran peton, ĉar ankaŭ nia redakcio devas batali por la informoj. Estas kelkaj instruistoj ĉirkaŭ la redakcio, kiuj fidele sendadas materialojn, sed la kontakto kun la landaj sekcioj kaj aranĝoj ne funkcias perfekte. Ĝis nun nur tre malmultaj sekciestroj sendis al mi materialojn (escepto ekz. *Márta Kovács*, *Hans ten Hagen* kaj la nova finna sekciestro, *Raita Pyhälä*). Se ĉiu sekciestro nur unufoje sendus ion en unu jaro, mi havus naŭ aktualajn materialojn por ĉiu numero. Mi scias, ke ne tio estas via ĉefa tasko, kaj ne ĉiuj el vi havas tempon verki. Tamen vi estas tiuj kompetentaj personoj, kiuj havas la plej grandan superrigardon pri via lando, kiuj havas la plej bonan kontakton kun la lokaj pedagogoj, institutoj, verkemuloj ktp. Do, mi petas vian kontribuon por ke IPR estu pli aktuala kaj freŝa ol ĝis nun.

Jozefo Németh, redaktoro

SEKCIESTROJ de la LIGO

Albanio: Bardhyl Mezini, Rr. Maliq Muco, Pall. 50, ap. 3, Tirana.
Argentino: Herminia Kirkerup de Fernandez, Calle Cerrito 1249, Barrio San Martín, AR-5000 Córdoba, (Córdoba).
Aŭstrio: Mag. Walter Klag, Rudolfinergasse 8/11, AT-1190 Wien.
Belgio: Raymond. Wylleman, A. Vermeylenstr. 65, BE-8400 Oostende.
Brazilo: Elvira Fontes, Rua Machado de Assis 243, ap. 11, BR-04106 Sao Paulo (SP).
Britio: Arnold Pitt, Yew Tree Cottage, Ivington Road, Leominster, Herefordshire HR6 8QD.
Bulgario: Kiril Velkov, D. Todorov 9, BG-3000 Vraca.
Ĉeĥio: Miroslav Malovec, Bosonozská 15/10, CZ-625 00 Brno.
Ĉinio: Zhang Danchen, General Foreign Languages Dept., 29-34 North Part, Huazhong Normal University, CN-430070 Wuhan.
Estonio: Eve Otsa, Liivalaia 30-12, EE-0001 Tallinn.
Finnlando: S-ino Raita Pyhälä, Jykyrintie 3, FI-69440 Lestijärvi
Francio: S-ino F. Drouard, Chalet Denali, Chemin de Thural, FR-74920 Combloux.
Germanio: Michael J. Scherm, Von Thürheimstr. 47, DE-89264 Weissenhorn.
Hispanio: vakas
Hungario: Kovács Márta, Ady E. u. 23-25/C, HU-1221 Budapest.
Israelo: Murjan Josef, P.K. 1289, IL-61012 Tel-Aviv.
Italio: Catina Dazzini, C.P. 22, IT-54100 Massa.
Japanio: Masumi Suzuki, Fukaya 122-10, Ayase-shi, Kanagawa-ken, 252
Koreio: So Jin Su, Dept. de Ekonomiko, Universitato Kangnam, Kugali Kihung-up, Yongin-gun, Kyonggi-do 499-900.
Kroatio: Ivan Bekavač-Basić, Kušlanova 59. HR-10000 Zagreb.
Kubo: H. Jiminéz, Vista Alegre 254 e/J.B. Zayas y Luz , Caballero, Vibroa, CU-11500 C. Habana.
Nederlando: Hans ten Hagen, Middenweg 587, NL- 1704 BH Heerhugowaard.
Nordameriko: Doroteo Holland, 5140 San Lorenzo Dr., Santa Barbara, CA 93111-2521, Usono.
Norvegio: Björn Thuv, Aröyveien 33, N-3135 Torod.
Pollando: p/a Silezia Esperanto-Asocio, ul. Dubois 3, PL-50-952 Wroclaw.
Portugalio: d-ro A. M. Coimbra, Rua Colonel M. Leitão 20.1 Esq. PT-1700 Lisboa.
Rumanio: Prof. Popa Florica, Str. Eroilor 29, ap.7. RO-1900 Timisoara
Rusio: Irina Gončarova, Moloeznaja 38-10, Odincovo 2, Mosk. obl. RUS-143000
Sanmarino: Marina Michelotti, Contrada del Collegio 51, RSM-43031 San Marino.
Slovakio: Anton Zachariás, Sobotské námestie 6, SK-05801 Poprad.
Slovenio: Sonja Tavčar, Liminijanska 6, SI-66320 Porotoroz.
Sud-Afriko: *vakas*
Svedio: Bertil Andreasson, Södra Rörum pl. 455, SE-24294 Hörby.
Svislando: Mireille Grosjean, Rue du Temple 20., CH-2416 Les Brenets.
Venezuelo: Prof. J.E. Bachrich, Apartado 70782, Caracas 1071 A.

REPREZENTANTOJ

Armenio: Lida Elbakjan, Moldovakan 26/2, kv. 52, Erevan.
Aŭstralio: Max Wearing, 30 Westbury St, Hackney, SA 5069.
Bangladeŝo: Sultan Ahamad, Factory Inspection Dept., 4 D.I.T. Avenue, Dhaka-1000.
Centrafrika Respubliko: Luc Feidangai, B.P. 70, Bangui.
Ĉilio: Luis A. Vera, Isabel Riquelme 7115, Pobl. C. Estrella, La Cisterna, Santiago.
Hindio: Abani Halter, Jamboni, P.O. Bolpur 731204, W. Bengal.
Irano: Mohammad Karamudini, P.O. Box 13445-747, Teheran. Iran.
Islando: Loftur Melberg, Skolabraut 1, IS-220 Hafnarfjördur.
Jugoslavio: Radojica Petrovic, Bul. Oslobodjenja 36, YU-32000 Cacak.
Kostariko: Jorge A. Leoni de León, Apartado 7603-1000, San José.
Litovio: Algimantas Piliponis, Karolinisiu 3-93, LT-2044 Vilnius.
Niĝerio: Godwin Oboh, University of Ekpoma Wan, Illeh Box 62, Epoma Bendel.
Nov-Zelando: Gwenda Sutton, 12C Herbert Gardens, 186 The Terrace, Wellington 1.
Sud-Afriko: vakas
Tanzanio: Mramba Simba, S. L. P. 1051, Bunda Mara.
Togolando: Afantchao-B.Yao,B.P.20225 Lome.
Ukrainio: Svetlana Fedotova, P.O. Kesto 88, UA-253222 Kiev.
Uzbekistano: Eugeno S. Perevertajlo, Ab. kesto 140, Taŝkent.
Zairio: Ngangu Nduantoni-Bakidila, B.P. 13, Lukala (Bas-Zaïre).

LABORKOMISIONOJ

Didaktikaj ludoj: Georges Sossois, rue du Basson 79, BE-6001 Marcinelle, Belgio; tel. (+32 71) 43 62 05.

Ekzamenoj: prez.: d-ro Till Dahlenburg (adreso, kovrilo 2). Sekretario de elementa kaj meza niveloj: d-ro Ivan Bekavac-Basić (adreso, kovrilo 3)

Eŭropa Komunumo kaj informado en pedagogiaj medioj: Edward Symoens, Putsesteenweg 151, BE-2920 Kalmthout (Heide), Belgio; tel. (+32 3) 666 62 66.

Gazetara servo kaj informado: *vakas sed pretas kunlabori:* Germain Pirlot, Steenbakkerstr. 21, BE-8400 Oostende; tel. (+32 59) 70 87 00 kaj Walter Klag, Rudolfinergasse 8/11, AT-1190 Wien, Aŭstrio; tel. (+43 222) 36 86 29.

Konkursoj lernejaj: Géza Kurucz, Nyíri u. 11, HU-6000 Kecskemét, Hungario.

Lerneja kontaktigo kaj statistikado: Provizore plenumata pere de *Juna amiko*.

Statuto: Rob Moerbeek kaj Oene Hoekstra, Frederikslaan 47, NL-1871 SB Schoorl, Nederlando; tel. (+31 2209) 15 65.

Terminologio: Mauro La Torre, Viale Bardanzellu 117, I-00155 Roma, Italio

KUNLABORANTAJ INSTITUCIOJ

UNESKO: (rilatoj de reciproka informado, kat. C): Place Fontenoy, FR-75007 Paris. Reprezentanto de ILEI: François Lo Jacomo, 21 rue Juliette Dodu, FR-75010 Paris

UEA: Universala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam.

IEI: Internacia Espereanto-Instituto, Riouwstraat 172, NL-2585 HW Den Haag.

KCE: Kultura Centro Esperantista, BP 779, CH-2301 La Chaux-de-Fonds.

KONTRIBUAĴOJ AL IPR

Kontribuaĵoj al IPR estu laŭeble nete tajpitaj per nigra rubando sur blanka papero kun adekvataj marĝenoj, taŭga por aŭtomata komputila enlego, aŭ surpapere prespretaj. Livero sur IBM PC-kongruaj disketoj (5,25 aŭ 3,5 colaj) bonvenas. Adreso de la redakcio sur la kovrilpaĝo, komputila retoadreso kaj telefaks-adreso post la Enhavo. Fakaj artikoloj prefere ampleksu 3 ĝis 8 presitaj paĝoj. Pedagogiaj novaĵoj, informoj pri edukaj aranĝoj, interŝanĝaj gazetoj kaj leteroj al la redakcio bonvenaj. Ni recenzas nur ricevitajn eldonaĵojn iel rilatantaj al edukado aŭ utilaj en instruado. Regulaj redakciaj kunlaborantoj serĉataj, ekzemple por prizorgi iun rubrikon – prefere kun aliro al komputilo kaj kapablaj liveri materialon diske aŭ presprete.

MEMBRIĜO AL ILEI KAJ PAGADO POR ALIAJ SERVOJ

La membreco inkluzivas ricevon de kvar numeroj de IPR jare. Turnu vin al via landa sekcio, kiu fiksos kotizon en via propra valuto. Por pagi rekte al la internacia ILEI, skribu al la kasisto:

Kasisto de ILEI: B. Andreasson, Södra Rörum pl. 455, S-242 94 Hörby, Svedio; poŝtĝirkonto 682117-7 (Stokholmo). Membreco kostas 80 svedajn kronojn en landoj sen sekcioj kaj 100 SEK en landoj kun sekcioj (la sekcio ricevos la diferencon). Pro altaj banko-kostoj, evitu bankĉekojn kaj eĉ internaciajn poŝtoĝirojn; taŭge plenumita Euroĉeko plej bonas. Alia pagmaniero estas al UEA:

UEA, Nwe. Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, pĝk 37 89 64. UEA akceptas kredit-kartajn pagojn. Klare indiku la celon de la pago kaj la internan konton de ILEI: *ilek-a.* aŭ por *Juna amiko*: *juna-l.* Prefere informu senpere la kasiston de ILEI pri la enpago. Membreco: 20 GLD en landoj sen sekcioj, 25 GLD en landoj kun sekcioj.

Hungara ILEI-sekcio: (adreso: tria kovrilpaĝo) akceptas pagojn en hungaraj forintoj de reform-eŭropanoj por membreco kaj aliaj servoj de la Ligo.